

Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista

Unu numero : 4 FF. Unujara abono kun adresaro : 25 FF

Ĝiri al la poŝtkonta numero 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto :

Cercle amical esp. de l'Agenais, F 47340 Laroque Timbaut

\*\*\*\*\*

# HIMNO AL LA ĜOJO

*Dum ĉio ĉirkaŭ ni instigus nin prefere al la malgajeco kaj malkuraĝiĝo, pro la multaj abomenaĵoj ĉie en la mondo, mi pensas, ke estas ankoraŭ loko por la ĝojo, se ni scias malkovri ĝin.*

*La ĝojo estas antaŭ ĉio la sento de la pleneco de la vivo. Tio estas la signo, la esprimo de la biologia ekvilibro plej perfekta. La ĝojo estas eliksiro de la vivo, talismano kontraŭ la malsanoj, la malbona sorto, kaj la plej bona kontraŭveneno kontraŭ la timo. La maltrankvilaĵoj estas unu el la kialoj de la malbona cirkulado de la sango en la histoj kaj de kelkaj organismaj malordaĵoj. Do ni ĝojigu nin pli ofte, kaj la vivo fariĝos pli facila : estas vere, la ĝojo heligas, lumigas kaj liberigas. Filozofo prave diras, ke la kutimo vidi la aferojn sub la bona lumo estas pli grava ol alta salajro.*

*Ni lernu sekvi la konsilojn de Roza Luksemburg : "Kiam oni*

havas la malbonan kutimon serĉi venenan guton en ĉiu floro, oni trovos ĝis sia morto ian kialon por lamenti. Do prenu la aferojn sub la mala angulo kaj serĉu mielon en ĉiu floriĝo : vi ĉiam trovos ian kialon de serena ĝojo.

"La vivo estas por mi fonto de ĝojoj : ĉiumatene mi skrupule inspektas la burĝonojn de ĉiuj miaj arbustoj kaj kontrolas kiel ili estas. Ĉiun tagon mi vizitas ruĝan kokcinelon, kiun mi persistigas viva sur branĉo en bandaĝo de varma vato ; mi observas la nubojn, ĉiam pli belajn kaj senĉese malsamajn kaj fine mi ne konsideras min pli grava ol tiu malgranda kokcineleto kaj, penetrite de la sento de mia malgrandego, mi sentas min neesprimeble feliĉa..."

Se ĉiuj artoj povas kontribui al tiu ĝojostato, kiu fariĝas konstanta, kiu fariĝas spirita kutimo, ardeco por vivi, ĉiuj niaj agoj inspirataj de la malavareco, la respekto, altruismo, estas ankaŭ fontoj de ĝojo aktiva kaj radiantaj : feliĉigi la aliulojn donacas al ni multe da ĝojoj.

La korpo povas esti katenita, la spirito restos libera, se ĝi konas la ĝoj-arton. Roza Luksemburg skribanta al sia amikino el la malliberejo, kie ŝi estas enkarcerigita pro siaj ideoj, en decembro 1917, estas ekzemplo inter aliaj, malpli konataj : "Mi estas sola ĉi tie, en la trankvileco, envolvita de la multaj faldoj de la nigra mantelo de la vintro - la mallumo, la enuo, la manko de libereco - kaj tamen mia koro batas pro interna ĝojo, nekonata, ne komprenebla. Mi travivas la samajn sentojn kvazaŭ mi irus tra la herbejoj sub luma suno. Kaj nokte, kiam mi estas sterniĝinta sur mia matraco, la vivo ridetigas min, kvazaŭ mi konus sekretan sorĉon por ŝanĝi malbelecon kaj malĝojon en mirindan belecon kaj grandegan ĝojon. Konstante, mi serĉas en mi la kialon de tiu ĝojo kaj, ne trovante ĝin, mi ekridas pri mi mem. Mi do pensas, ke tiu sekreto kuŝas en la vivo mem. Mi dezirus povi profitigi vin per tiu magia ŝlosilo, por ke vi povu koni en ia ajn kondiĉo, la belecon, la grandecon de la vivo..."

Bedaŭrinde, estas nur post grava malsano aŭ akcidento, ke preskaŭ ĉiuj homoj ekkonscias, ke la vivo mem estas ĝojo.

Julie 1982, kiam mi estis sur la montaro, kun mia edzo kaj filo, mi havis akcidenton, kiu povus mortigi min : mi ricevis sur la dorson kaj la piedon trunkon de lariko. Tuj mi vidis kuraciston, kiu radiografis min. Feliĉe por mi, mi havis nenian ostarompon ĉe la dorso. Sed mi devis resti tri semajnojn en la lito, ĉar mia dorso multe doloris kaj mi ne povis meti mian piedon teren. Dum pli ol unu jaro mi malfacilege marŝis. Tiu akcidento tre bone montris al mi, ke ni devas gustumi la nunan tempon, ŝiri la plej malgrandan ĝojon

de la vivo ; mi spertis ankaŭ, ke ridetoj estas pli efikaj ol ĝemoj.

Do ni ne atendu, ke malsano aŭ akcidento senmovigas nian korpon, por ekkonscii, ke ni havas gambojn por esplori la mondon, okulojn por ekstazadmiri antaŭ la belaĵoj de la naturo, manojn por karesi, krei belecon, bonecon, orelojn por aŭskulti la aliulojn, la birdojn, muzikon. Ni trinku ĉe la fonto de la bonhumoro, de la gajeco, kaj kiam ni travivos afliktitaĵojn, ni povos ĉerpi el niaj lumaj trezoroj.

Ni ne forgesu, ke morgaŭ la suno ankoraŭ brilos kaj ĉiam estos en la universo stelo por konduki nian esperon.

Michèle FREUD

### ŜPARIGI MONON AL "Laŭte!"

Mi iom konas la administranton de L. Generale, li ĝemas pli pri siaj reŭmatoj, ol pri la malbonfarto de la bulteno. Tamen, lin karakterizas granda malavaro pri alies mono kaj la enkasigitan monon li plej ŝpareme uzas. Tial li ĵus atentigis min pri jeno iom elspeziga :

Al abonantoj en Francio, por ĝui la rabat-an afrankon, li devas nepre sendi ĉiujn ekzemplerojn de sama numero samtempe, kiam ĝi aperas. Se, **pro malfrua reabono**, li devus sendi aparte antaŭajn numerojn, tiam la afranko estus tiu por ordinaraj leteroj. Por ĉiu tiel sendita numero la "perdo" estas 1,80 (50-grama numero) aŭ 2,60 FF (100-grama) ! Kalkulu mem kiom necesas krome elspezi, kiam necesas tiel sendi plurajn malnovajn numerojn !

- Bone, bone ! Diru kion ni faru !

- Nu, eblas elekti :


- \* aŭ akurate reaboni ĵarfine, aŭ kiam slipeto indikas la finon de la abono ;
- \* aŭ aldoni 2 FF por ĉiu ekzemplero ricevota pro malakurata reabono ;
- \* aŭ rezigni la mankantajn numerojn.

- Luj, eble hontemaj pro sia malfruo, preferas tute ne reaboni !

- Jes, povas okazi. Sed ili estu certaj, ke ni konservas por ili nian tutan simpation. Eble "Laŭte!" ne plaĉis al ili ? Tio povas okazi. Ni povas nur peti de ili lastan komplezon : skribi al la redaktejo la kialo(j)n de sia forlaso. Ili povas eĉ skoldi nin ! Ni tamen dankos pro la servo !


Kompreneble, monperdo same okazas, kiam transloĝiginta abonanto forgesas sendi al L! sian novan adreson. Ekde kiam unu numero revenis al ni kun la mencio "Foriris - Ne loĝas ĉe la menciita adreso", ni ne plu sendas. Ĉiujare okazas pluraj tiaj aferoj. Ni povas nur supozi, ke ili profitis de sia transloĝigo por malaboni... aŭ perdis la adreson de L! dum la transloĝigo de sia meblaro !!!

La Red.



# homoj

## kaj aŭtoj



### Kribo :

Aŭtomobilo, aŭto, aŭtaĉo... Jen perfekta ekzemplo de nura rimedo, kiu fariĝis celo, fakte kondiĉanta la tutan vivon de multaj nuntempuloj. Kiuj ne havas ĝin, tiuj sopiras ĝin ; kiuj havas ĝin, tiuj avidas pli belan.

La kondiĉado trafas jam la infanon, kiu ludas per aŭtetoj. Por junulo aŭ junulino la simbolo de "emancipiĝo", krom la tabakfumado, estas la ekposedo de aŭtomobilo. Per aŭto junulo sentas sin pli "armita" por ekrilati kun junulinoj. Junulino, kaj ino ĝenerale, povas "eskapi" la ĉasantajn virojn, nur kiam ankaŭ ŝi translokiĝas ŝirmate en sia kvarrada ferskatolo. La aŭto iĝis dua haŭto !

La individua ekvilibro estas minacata. La aŭtulo ne plu kapablas marŝi, ne plu kapablas marŝi plenaere. Ne gravas ! Li aŭ ŝi transiras de klimatizata hejmo al laborejo per fermita kesto. La efiko al korpa sano estas katastrofa : nervoj, koro, muskoloj, ĉio sklerozigigas. Kaj mi ne aludu pri la mortigaj, vundigaj akcidentoj, la ellasataj gasoj...

La aŭto kondiĉas ja la tutan ekonomion, forrabas gravan parton el la naciaj devizoj. Mondskale la malŝparo pro aŭtoj rekte kontribuas al malsatego. Ekologimaniuloj priploras la fakton, ke oni foroferas grandajn areojn betonitajn por cirkuligi aŭtaĉojn kaj kamionojn. Sed egan amason da mono la automanio drenas : aŭto-fabrikado, benzin-industrio, vojkonstruado kaj riparado, kosto de akcidentoj.

La socio de industria landoj estas selektita en klasojn per la aŭto : junaj homoj, kiuj (ankoraŭ) ne havas aŭton ; maljunaj, kiuj neniam lernis stirarton kaj ne plu kapablas lerni ; senmonaj senlaboruloj, kiuj ne povas trovi laboron, se ili unue ne povas veturi al la laborloko, ktp...

La urbanizado estas ligita al aŭtosvarmado : oni iras al urboj per aŭtoj por labori, aĉeti, sin distri. Oni fuĝas la urbojn per aŭtoj ferie kaj semajnfine.

Cinikuloj asertas : "Eble la aŭto ŝparigis al la homaro mondmiliton : ĝi ĉiutage mortigas junajn homojn, tute same kiel freŝa kaj ĝoja "klasika" milito! "

La posedo aŭ neposedo de aŭto igas agresema. Mi - senaŭtulo - ne eskapas : mi ne plu emas bicikli sur ĉefaj vojoj, mi fuĝas la urbajn haladzojn, mi eĉ ne kuraĝas pluki fruktojn aŭ fungojn troveblajn rande de aŭtovojoj !

- Hej, kiel do, Kribo, ci veturas longajn distancojn ?

- Mi konfesas, ke mi estas fervojisto. Sed, fu(1)motondro, mi ne eltenas la modernajn pasaĝervagonojn, kies fenestrojn oni ne povas malfermi ! Vere, kion mi faraĉas en tiu ĉi mondo ?

- Sed eble cia edzino uzas aŭton, ĉu ?

- Ho jes, mi konfesas ankaŭ, ke mi foje sidas apud ŝi, ĉe la t.n. "mortula" loko (ĉar malantaŭe mi estus malsana!). Sed mi havas pli kaj pli la impreson, ke mi erare naskiĝis en la nuna jarcento. Ĉu ne ankaŭ vi ? Kion vi mem opinias ? Kiel vi elturniĝas ? Kia estas la loko de aŭto en via propra vivo ? Ĉu la pozitivaj aspektoj sufiĉe kompensas la negativajn ?

### Thérèse :

Ĉu la aŭton mi ŝatas ? Mi devas diri, ke la aŭton mi uzas regule : por iri labori, ĉar mi bezonus trioblon da tempo per publikaj transportoj ;

- por viziti la landojn dank'al ruldometo (ankaŭ dank'al esp.);  
- por kunveni kune kun miaj gepatroj, kiuj loĝas provinco kaj sen veturilo. Unufoje ili venis por veturigi min je 50 km de sia domo. Mi alvenis post preskaŭ tuta tago, tamen ili loĝas je nur 280 km de Parizo.

La fakto posedi aŭtomobilon instigas nin konservi geamikojn, kiam ili translokiĝas provincon, do tio utiligas aŭton. Sen veturilo eble ni vartus pli proksimajn amikecojn ol malproksimajn... Mi memoras, ke, en la pasinteco, miaj gepatroj vizitis siajn gepatrojn nur unu fojon jare, dum la libertempoj. Do, neniam ili povis viziti aliajn provincojn aŭ landojn.

Tamen, la aŭto-fakto incitas min pro sia neceso, pro sia kosto, pro sia polucio, pro la adoro, kiun multaj homoj (ĉefe viroj) havas al ĝi, pro la akcidentoj, kiujn ĝi fontas, pro la invado de la urbolokoj...

*Ma debate*

*Mi memoras la jaron, kiam mi pripensis la aŭto-aferon, ĉar ĉiam, kiam mia edzo volis ŝanĝi nian veturilon, tio incitis min. Mi pesis la ĉi-suprajn kaŭzojn kaj decidis ne plu tro incitiĝi kontraŭ veturiloj, ĉar mi ne vere povis ŝanĝi la evoluon de tiu medio.*

*Bedaŭrinde, la popoloj, la regantoj, ne sufiĉe disvolvas pli ekologiajn transportrimedojn ebligontajn tian evoluon. Plie, la senpagaj transportoj, ŝajnas al mi, nur pligravigos la publikajn rimedojn.*

**J.G. :**

Pro mia relativa maljuneco mi spertis la du epokojn : preskaŭ sen aŭtoj ĝis la jaro 1960 kaj kun aŭtoj poste.

Kiam mi estis infano antaŭ la dua mondmilito, mi iris el mia hejmo al la lernejo (6 km) bicikle sur glata, trankvila vojo meze de la bovinaj kaj ĉevalaj jungitaroj. Nun tiu vojo estas unu el la plej danĝeraj en Francio (preskaŭ ĉiutage okazas akcidento).

En mia vilaĝo nur kelkaj eminentuloj posedis aŭtojn. La loĝantoj, preskaŭ ĉiuj terkulturistoj, ankaŭ komercistoj kaj metistoj, loĝis surloke aŭ tute proksime. Preskaŭ neniu vojaĝis. Mia avino vojaĝis nur unufoje en sia tuta vivo, mia avo iom pli pro la unua mondmilito, mia patro preskaŭ nur dum la militservo, mia patrino kvar aŭ kvin fojojn en sia vivo. Oni ne bezonis aŭtojn, kiuj estis luksaĵoj.

Poste mi laboris kaj loĝis en Parizo. Ĉiun trian minuton preterpasis subtera vagonaro, kiu kondukis min ĝis iu ajn parto de la urbo. Kiam mi vojaĝis, mi uzis trajnon aŭ petveturadon (dankon al aŭtoposedantoj !). Mi ne bezonis aŭton.

Kelkajn jarojn poste, mi estis devigata labori kaj loĝi en malgranda kaj izolita vilaĝo. Nur amikoj, kiuj loĝis en la ĉirkaŭaĵoj kaj posedis aŭton, povis viziti min. La kontraŭo ne eblis. Se mi volis ĉeesti kunvenon aŭ spektaklon en la najbara urbo, mi devis trovi personon, kiu bonvolu konduki min kaj rehejmenigi min. Kiam mia filo naskiĝis, ni nur lastmomente sukcesis trovi veturilon por konduki mian edzinon ĝis la hospitalo. Post tiuj spertoj, kiam mi aĉetis mian unuan (malnovan) aŭton, mi sentis ĝin kiel liberigilon !

Nun mi loĝas en mezgranda urbo iom ekstere de la centro. Estas ja pli kaj pli malfacile loĝi en la urbo kaj la novaj loĝantoj estas devigataj loĝi relative malproksime de la lernejoj, kiuj situas en la ĉefurbo. Aliflanke estas profesioj, kiuj devigas la loĝantojn veturi tra la vilaĝoj en la kamparo, do posedi aŭton, kelkfoje du, kiam en la paro iu laboras norde kaj la

alia sude, ĉar ne ekzistas kolektivaj veturiloj aŭ nur tre maloftaj. La problemoj, laŭ mi kaj laŭsperte, estas malsimila en malgrandaj urboj, kie ekzistas nenia kolektiva transportrimedo kaj en la grandaj urboj, kie ekzistas transportservo adaptita al la laborhoroj. En mia urbo, ekde tiu ĉi jaro la urbestrararo plibonigis la aŭtobusan servon kaj nun mi pli ofte uzas ĝin kaj lasas la aŭton en la garaĝo. Estas vere, ke mi estas emerito kaj ne plu estas ligita al la laborhoroj. Tamen mi estas devigata uzi aŭton por ĉeesti kunvenojn kaj viziti amikojn, ĉu vespere, ĉu ekstere de la urbo.

Mi ne kredas, ke oni povus forigi la uzadon de aŭto en nia nuna socio, eble malgrandigi ĝin per la disvolvigo de la kolektivaj transportrimedoj sed jen malfacila afero pro la potenco de la aŭto-premiloj (vidu la strikon de la ŝarĝveturistoj en Ĉilio kaj ankaŭ la protestojn de la sindikatoj, se la produktado de aŭtoj ne kreskas sufiĉe) - due, pro la pasia rilato kiun la homoj havas kun siaj aŭtoj. Por kelkaj aŭtoj estas rimedo por certigi ilian personecon per rapideco aŭ bela kaleŝfarado, ilian memiluzian sendependecon. La junuloj, laŭ mi, ŝatas pli la motorciklojn, kiuj rondiras kaj faras bruon !

Konklude, laŭ mi aŭto devus ĉiam resti servisto (ofte utila), sed neniam mastro.

### **Neserioza (?) B\*E-kontribuajo de Ĝiz el Lamark :**

*Mi ne havas antaŭjuĝojn kontraŭ la aŭtomobiloj. Sed laŭ mi oni ne povas nei, ke ilia speco okupas nian landon kvazaŭ malamika armitaro. Ĉu vi tion ne kredas, kaj postulas certigon ?*

*Nu, pripensu kiom ni devas pagi al la "okupantoj" por teni ilin sanaj kaj rapidkuraj, dum nia propra sano pli kaj pli malboniĝas en la kontraŭhomaj urbegoj faritaj por ILIA komforto.*

*Ni ne plu povas sendanĝere kaj trankvile piediri eĉ en la malnovaj urboj iam faritaj por la homaj necesoj : malantaŭ ĉiu strat-angulo povas kaŝiĝi ek-kuronta fajr-okula aŭtomobilo, dezireganta pentri la straton ruĝa.*

*Ĝenerale, la aŭtomobiloj tre ŝatas la pentraĵ-specon nomatan "morta naturo".*

*Ili mort-premas - pardonu, mi eraris : ili mort-pentras hundojn, katojn, homojn kaj similajn objektojn per gaja ruĝo sur la griza strato.*

*Ĉu nur por artisma celo, aŭ ili intencas ĉas-malaperigi ĉian vivantan specon ?*

Ili minacas morton ne nur al niaj infanoj - kiuj ne plu povas ludi ĉe la stratoj - sed ankaŭ al la malmultaj arboj penantaj sin viv-teni en la urboj : iom post iom ili malvigligas pro la malsanigaj ellasaĵoj de la aŭtomobiloj kaj iliaj parencoj.

Sed ni homoj emas fermi niajn okulojn kontraŭ la vera situacio kaj rigardi, anstataŭe, la utilon kiun ili kontraŭvole donas al ni, tio estas la veturadon : ja ĝis nun ili bezonas nin, ĉar ili ne povas malhavi ian malbonodoran fluaĵon, eĉ alt-kostan, kiun nur la homoj povas havigi al iliaj malsataj metalaj korpoj.

Sed se ni eltrovos ĉiam-daŭran nutraĵon por ili... ha, tiam ili certe "forĵetos sian vizaĝ-kaŝilon" kaj sin montros al ni tiaj, kiaj ili rigardas sin mem : ne servistoj, sed mastroj.

Kelkaj el ili eĉ imitas la reĝojn kaj grand-sinjorojn de la profunda pasinteco ; kiam ili sentas, ke ilia "lasta horo" alproksimiĝas, ili deziras forlasi la ekziston kune kun kiel eble plej mult-nombra sekvantaro el dis-premitaj "mol-korpuloj". Ĝis kiam la homaro paciencas elportos ? Kial ĝi ne krias "Jam sufiĉe!" kaj sin levas kontraŭ siaj subpremantoj (en la plena senco de l' vorto!) por reakiri sian liberecon ?

Pri mi mem, mi ne elportus "konduki" aŭtomobilon, ĉar kiam mi devas iri de loko A al loko B, mi preferas pripensi interesajn ideojn, sed ne esti devigita streĉi mian atenton, por eviti, ke mia aminda aŭtomobilo subite decidu pentri amindan ruĝan makulon sur la strat-grizaĵo tiel malgaje unukolora.

Vi povas do kompreni, kial mi kutime veturas per miaj propraj kruroj, aŭ per aŭtobuso aŭ per vagonaro ; sed mi ne havas antaŭjuĝojn kontraŭ la aŭtomobiloj, tute ne ! Nur, mi rifuzas kunlabori kun la malamiko. Ĉu mi malpravas ?

#### Memintervjuo de Ĵansebo :

- Ĉu vi estas por Aŭto ?
- Mi supozas, ke vi intencas paroli pri persona veturilo. La demando havas du sencojn, je individua kaj socia skaloj : "Ĉu vi emas uzi ĝin?", kaj "Ĉu la estraro devas favori ĝian uzadon, prefere al publikaj transportoj ?"
- Komencu oper la unua.
- Mi ne ŝatas ĝin, ĉar ĝi estas fonto de miskontentiĝo. Ĝi neniam funkcias, kiam mi volas. Mi devas zorgi pri ĝi, varti ĝin, lavi ĝin, trovi lokon por parki ĝin kaj reveni al la sama loko por retrovi ĝin. Kia sklaveco !
- Tamen estas komforte. Ĉefe kiam vi loĝas en misekipita

suburbo kaj se vi volas iri en alian suburbon.

- Kompreneble. Sed feliĉe mi loĝas apud rapida metroolinio. Sed mi reaĉetis veturilon.
- Ĉu vi iam vivis sen ĝi ?
- Jes. Dum 7 jaroj. Kun mia edzino kaj infanoj. Ne estis facile, sed fareble. Tamen la aliuloj ofte transportis nin.
- Ĉu tio ne estas parazitismo ?
- Jes. Sed tio estas sensolvaĵo. Ŝajnis logike al mi partopreni al la elspezoj sed mi povis ĝin fari nur por longaj vojaĝoj. Alikaze estus ofendige.
- Kial vi reaĉetis unu ?
- Mi ne estas Don Kihoto. En nia socio, multe da ĝenoj estas kreitaj por tiuj, kiuj ne havas personan veturilon. Mi ne estas masoŝisto.
- Ĉu ĝi estas profitdona ?
- Tute ne. Mi konsideras ĝin kiel senutilaĵon, kiu foje estas pli komforta ol la publikaj transportiloj. Sed kiam ĝi misvolas funkcii, ne estas tro grava problemo. Mi ankaŭ foje bezonas ĝin por la laboro. Ŝajnus al mi pli logike, ke la entrepreno pruntedonu al mi veturilon kaj zorgu mem pri riparadoj.
- Kiom ĝi kostas ?
- Mi ne scias. Konsumantasocioj faris la komputadon. Estas inter unu kaj du frankoj por ĉiu kilometro. Tio estas pli kosta ol tiom oni pensus.
- Ĉu la estraro devas favori ilin?
- Laŭ mi ne. Publikaj (aŭ privataj) servoj devas esti plibonigitaj.
- Estus sendungeco...
- La homoj tamen vojaĝus. Oni fabrikus trajnojn, busojn kaj taksiojn anstataŭ personajn aŭtojn. Plie, oni povas instigi la servojn elekti naciajn veturilojn, por limigi sendungecon.
- Kiel favori publikajn transportojn ?
- Kreante kompletan servon. Plej ofte oni ne uzas ilin, ĉar mankas nur unu (nesufiĉe profitdona) servo. Ĉu pro pakaĵo, ĉu pro infanoj, ĉu pro malproksimeco de urbeto al stacidomo, ...ktp. Foje estas pro malsekureco. Iuj metroolinioj estas vespere neuzablaj por solaj virinoj aŭ triaĝuloj.
- Estus koste. Bone mastrumata ekonomio devas forigi la neprofitajn partojn de la servo.
- Tio estas stulta rezonado. Kiu scias kiu parto de servo estas neprofitdona : Kiu metroovojaĝanto kostas pli da mono al la komunumo : Tiu, kiu uzas ĝin dum plejplenaj

horoj - devigante aĉeti pliajn vagonarojn por nur unu horo ?  
Aŭ tiu, kiu uzas ĝin dum malplenaj horoj, kiu petas malfermi la metron nur por kelkaj personoj ?

- Kiu estonto por aŭtomobilo ?
- Ĝi ŝajnas multpromesa, pro la emo de la homa specio preferi malsimplajn solvojn, kondiĉe ke ili ne ŝanĝu iliajn kutimojn... Mi esperas, ke iun tagon la Povo iĝos pli imagema...

### **Valo : Eks-fervojisto retrovas la fervojon.**

Antaŭ du jaroj, ĉar mia vid- kaj aŭdkapablo malakriĝis, mi rezignis plu ŝofori, kaj forvendis mian aŭton. Tiel mi perdis kelkajn agrablajn oportunaĵojn. Por vojaĝi mi devas nun trudi min al precizaj hortabeloj, iri al kaj de la fervojstacioj piede, aŭ per buso aŭ taksiaŭto, limigi la volumenon kaj pezon de miaj pakaĵoj...

Kompense mi reeltrovas la fervojon kaj ĝiajn avantaĝojn: komforta, sekureca, ne poluanta, ne multekosta, iafoje eĉ pli rapida.

Antaŭ ses jardekoj mi staris sur vaporlokomotivoj. Poste, dum multaj jaroj, mi aŭte veturis en konstanta risko pri paneo aŭ akcidento. Nun, en vagonkupeo, mi sidas aŭ kuŝas trankvile, kun sento de plena sendanĝereco. Mi povas moviĝi. Mi ne bezonas streĉi mian atenton pri la vojo kaj la aliaj cirkulantaj veturiloj. Mi ĝuas la vidon de la pejzaĝo tra larĝaj fenestrovitroj, kaj, se ĝi ne interesas min, mi povas dormi, manĝi, konversacii, legi, eĉ skribi. Je la fino de mia vojaĝo mi estas atendata en preciza horo kaj minuto, en kiu, krom escepto, mi alvenos akurate.

Mi diris : iafoje eĉ pli rapida. Per aŭto mi bezonis almenaŭ sep horojn por iri de Nimo al Parizo, en laciga nervostreĉo. Nun per la TGV (grandrapida trajno), mi atingas la ĉefurbon senlaciĝe en apenaŭ pli ol kvin horoj. Ĉu la fervojo estas arkaika transportrimedo ? Certe ne. En 1985 kiel en la tempo de Stephenson, la progreso ankoraŭ kuras sur reloj.

Oni ofte parolas pri la deficino de la fervojo, kaj oni pretendas, ke la vartransporto per la aŭtovojoj estas malpli kosta. Sed en tiu komparo, ĉu oni kalkulas la koston de la laboro por teni en bona stato tiujn vojojn konstante difektatajn per la trafiko de pezaj vartransportiloj ? Tiu kosto, krom la pasimpostoj senpere pagataj de la transportistoj, estas pagata de la ŝtato, t.e. de la impostpagantaj civitanoj, nome vi kaj mi. Kiom da mono ni dediĉas al ĝi ? Tion oni



## VORTOJ DE MALJUNULO

-----  
valo  
-----

### **Nacia identeco**

Mi legis leteron de S-ino Simone Veil responde al propono pri enkonduko de Esperanto en la Eŭropan Parlamenton. Ŝi diris, ke la ideo pri lingvo internacia estas bonega (unu post alia la oficialuloj tion agnoskas) sed ŝi ne aldonis, kiel S-ino Thatcher : "domaĝe, ke ĝi fiaskis". Male, ŝi ŝajne rigardas kiel eblan la triumfon de Esperanto kiel Eŭropa lingvo, kaj diras, ke tio estus domaĝa, ĉar la naciaj kulturoj perdis sian identecon.

Ĉu do la Belgoj perdas sian nacian identecon, kiam ili parolas france en Lieĝo kaj nederlande en Antverpeno ? Kaj la Svisoj, kiuj parolas germane en Berno, france en Ĝenevo kaj itale en Lokarno ?

En la nuna eŭropa komunumo estas uzataj ok diversaj lingvoj, sep se ni konsideras, ke la Irlandanoj, krom la gaela, parolas ankaŭ angle. Kiam la deko fariĝos dekduo, kun hispana kaj portugala, oni atingos dek lingvojn : vera Babelturo ! Kia domaĝo estus, se la parlamentanoj en Strasburgo interkomprenus per unu sola lingvo, sen la peza maŝino de samtempaj interpretadoj ?

En la centro de Nimo freŝdate aperis novaj platoj kun stratnomoj en la loka okcitana dialekto. Tio estas simpatia kaj folklore pitoreska sed sen granda praktika signifo kaj utilo. En la aŭtonoma hispana Katalunio nun la urbonomoj estas skribitaj katalune, kaj la radio kaj televido uzas ankaŭ tiun lingvon. Se iam Okcitanio fariĝus aŭtonoma, verŝajne okazus reflorado de la okcitana.

Se Korsikio kaj Novkaledonio sendependiĝos, ili adoptos respektive la korsikan kaj la kanakan. Eĉ mortintaj lingvoj kiel gaela kaj hebrea reviviĝis en Irlando respektive Izraelio. Ĉu tiaj faktoj estas progresaj aŭ regresaj ?

Klarvida estis reĝo Francisko la 1-a, kiam en 1539 (edikto

de Villers-Cotterets) li dekretis, ke la franca lingvo fariĝu deviga en la oficialaj aktoj. Tiun centralizan procezon akcelis la sinsekvaj reĝoj, la jakobenoj kaj la sekvantaj registaroj. Samtempe kiel la provincoj unueciĝis en nacion, ili adoptis komunan lingvon, per kiu nun la Bretonoj, la Alzacanoj, la Okcitanoj, la Rusiljonanoj, la Korsikoj, la francaj Vaskoj, ke, komunikas inter si kaj kun la Parizanoj. Oni povas bedaŭri la malvigliĝon de la provincaj idiomoj kaj de la koncernaj originalaj kulturoj, sed tio iras laŭ la direkto de historia procezo, kiun ne efike bremsas ariergardaj bataloj.

Nu, eble S-ino Veil estas pli klarvida ol unuavide ŝajnas. Eble ŝi komprenas, ke, se oni adoptos Esperanton, ĝi iom post iom forpuŝos la naciajn lingvojn kaj fine anstataŭos ilin. Tion ŝi opinias timinda. Sed ĉu ŝi konscias, ke vole-nevole, iam nepre kreiĝos lingva kaj kultura unueciĝo de Eŭropo, kaj fine de la tuta planedo ? Se tiu ĉi unueciĝo ne venos pere de Esperanto, ĝi certe fariĝos pere de la angla-usona lingvo, kaj ĉiuj nacioj perdos sian kulturan identecon profite al anglosaksa kulturo.

Tiu ĉi procezo estas jam nun en bona vojo, kaj se la esperantistaro en la tuta mondo ne streĉigos siajn klopodojn, ĉiuj niaj genepoj estos anglusonlingvaj.

Samideanoj ! ni ne sinku en la dormema rutino de niaj mizeraj grupkunvenoj ! Ni vekigu, skuiĝu, kaj ataku. La afero valoras la penon.

---

## Studante anglan lingvon

Bedaŭrinde, Esperanto ne estas tiom konata, ke ĝi estus parolata ĝis en la plej malgrandaj insuloj de Oceanio. Tial, se vi fariĝus ia specialisto laboranta en tiuj insuloj, vi nepre bezonus uzi anglan lingvon, se vi ne scipovus la polinezian aŭ melanezian lokan lingvon.

Paroli anglan lingvon, tio estas pli facila por diri ol fari. Eĉ se vi scipovas legi tiun lingvon, ne pli malfacila ol ia ajn eŭropa lingvo, tio ne helpas vin de unu joto por paroli ĝin. Ĉar fakte, kiel ĉiuj scias, estas du tute malsamaj lingvoj, kvazaŭ sen iaj ajn rilatoj. Sed multaj el ni verŝajne ne scias ĝis kia grado estas malfacile lerni la parolatan anglan. Nenia fonemo, kiel diras la lingvistoj, estas klare prononcata, tio dependas de la vorto (1). Por Francoj (kaj, mi aldonas, por multaj aliaj Eŭropanoj) la bazoj de prononcado estas tre malsimilaj kaj ofte la malo de ilia propra lingvo (2). Por ĉiuj

necesas uzi fonetikan alfabeton por klarigi prononcadon. Sed estas alia punkto, eble malpli konata : por legostudado por angla-parolantoj oni kreis komencan instruan alfabeton (Initial Teaching Alphabet) (3), ĉar kompreneble similajn malfacilaĵojn oni renkontas, kiam temas instrui legadon al infanoj. Oni konstatis, ke kvarono el la junuloj 15-jaraj en anglalingvaj landoj estas malbonaj legantoj (3).

Nu, amikoj, kiam vi renkontos farsulojn, kiuj vin diros, ke la angla lingvo superas Esperanton kiel lingvo internacia, demandu al ili, ĉu ili parolas flue tiun lingvon. Se jes : nenio direnda, se ne, vi povus diri al ili, ke ili ne scias pri kio ili parolas.

Mi ŝatus havi informojn pri **Basic English**, pri kio kelkaj el niaj kamaradoj ŝajnas bone informitaj. Ĉu estas instrulibro, ĉu ĝi estas uzata ie, kaj kie, kia estas la prononcado, la ĉefa malfacilaĵo en angla lingvo, kiel ni ĵus vidis ? Mi promenadis en multaj urboj, anglaj, usonaj, aŭstraliaj, ktp, nenie mi vidis ekzemple vendejon, kie oni anoncis "Basic English" parolata.

Pri baza Esperanto mi konsideras ĝin senutila, verŝajne eĉ ne ebla, ĉar ĝuste Basic English eblas nur ĉar angla lingvo estas ege riĉa, kun multaj ripetaj formoj, sinonimoj.

En Ĉinio, kie studado de ideogramoj estas ege malfacila, temas koni milojn da signoj, estas ankoraŭ 25 % da analfabetoj (4). Ne mirinde, ke ili interesiĝas pri Esperanto. En Hindio, kie 70 % el la loĝantaro ne scias legi (5), tio reprezentas 500 000 000 da analfabetoj. Aldoni, ke ekzistas proksimume 200 lingvoj en tiu lando, neniel helpas. Tio signifas, ke tra la mondo milionoj da homoj restadas en mal-lumo de nescio, predoj por ĉiuj religioj kaj ekspluatadoj.

J. DEKER

(1) H. Adamczewski, D. Keen : Phonétique et Phonologie de l'Anglais contemporain, Armand Colin, Paris, 1973, p. 40.

(2) Sama verko, p.53.

(3) Sama verko, p. 44.

(4) "Le Monde", 28 Septembro 1984.

(5) Ducroc en "Science & Avenir", n° 448, Juin 1984, p. 69.

---

Noto de la red. : Kvankam la artikolo de amiko J. DEKER ŝajnas respondi la artikolon de amiko Valo, tio estas nur koincido. Kulpas nur la oportunismo de la red., kiu malice ekspluatis la aferon, sekvigante iun artikolon per la alia. La legantaro bonvolu indulgi al la red. : izolite en sia kamparo, li distras sin per tio, kion li trovas...

Nova noto de la red. : La ĉi-supra noto celis fakte ŝtopi la paĝfinon, kaj jen, trafita la celo !

## ĈU VI SCIAS, KIOM DA STELETOJ STARAS...?

Estis iam malgranda knabo en eta vilaĝo kun cirkle ronda lageto. La knabo estis nomata Erik. Same kiel la aliaj knaboj en la vilaĝo, ankaŭ li estis aventurulo, knabo, kiu volis scii, kio estas tio, la mondo ? Bunta ĝi estis kaj nekredible bela. Sed ekzistis ankaŭ aĵoj ne laŭordaj.

Ekzemple estis tie la patro. Pro tio, ke Eriko ankoraŭ ne lernis per pseŭdosciencaj ĉirkaŭskriboj pliheligi la aĉajn aferojn en la mondo, li simple nomis lin : malica patro. La patro drinkis, kaj se li estis drinkinta, tiukaze li draŝis la patrino de Erik. Senrespekte li draŝis, tiom, ke la patrino ofte mal-esperis, ke ŝi konsideris la vivon puno kaj fojfoje amare ploris. Se ŝi ploris, Erik mankaresis ŝian hararon.

Ne estas tiom danĝere, patrino mia, li diris en tiaj momentoj al ŝi, ĉio boniĝos, certe ĉio ree boniĝos. Kion alian fari ? La patro estis ja kiel granda peza nimbuso en la ĉielo. Se li ekfuriozis, tiam ne eblis retiriĝi. Fulmotondroj oni devas akcepti, jen nenio helpas. Oni povas fuĝi en domon, ja tion oni povas, sed oni ne povas forpeli fulmotondron. De kie preni tiom da aeroplanoj por tio ?

Venis tago, en kiu la patrino de Erik tiom ege malesperis, ke ŝi prenis hakilon por mortbati la patron. Kiam ŝi minacis al li per la hakilo, li nur ridis. Li deigis la hakilon de ŝi kaj ĵetis ĝin tra la loĝoĉambra fenestro enkortem... Per la hakilo oni hakas brulŝtupojn, patrino, oni ne mortbatas homon per tio, diris gaje la potenca patro. Estis ankaŭ por li neskribita leĝo, ke neniu kapablas venki lin.

Ne tre fore de la vilaĝo situis alia vilaĝo. Kaj en tiu vilaĝo vivis la avino de Erik. Bonkora estis la avino. Ja, zamenhofa boneco estis en ŝi. Tiom ofte, kiom eblis, Erik vizitis la avinon kaj rekompense lasis mankaresi sin mem.

Kiam iutage denove giganta ŝtormo traskuis la gepatran domon, Erik decidis forlasi ĝin por ĉiam. Plej prefere li estus kaŝinta sin. Sed ne eblis. La plej proksima urbo fore estis minimume je mil kilometroj. Tial Erik decidis fuĝi al la avino.

Rapide li eliris el la domo, kaj eĉ plej rapide for el la vilaĝo. Kaj nur kiam kelkaj metroj estis inter li kaj la enirŝildo de la loko, Erik profunde elspiris.

Estis somero, kaj brile bluis la ĉielo. Turnante sin, Erik havis la impreson, kvazaŭ nun la tuta mondo apartenus al li.

Li ekjubilis kaj pepkantis, kiel li lernis de la sciigemaj pepantoj. Hej ĥo kaj hoho ! Kiel belege povas esti la vivo. Hej ho kaj hohoho ! Erik trumpetis sian vivĝojon enmonden. Dekstre kaj maldekstre de la vojo ondis orflave la spikokampoj. Elegante kliniĝis la tigoj antaŭ Erik, kvazaŭ ili intencus diri : Ĉe dio en la alto ! Vi estas ja efektive kuraĝa bubo !

Ja fulmo kaj tondro ! Bela estas la vivo, tute eksterordinare bela. Erik kantis tiel laŭte, kiel eblis. Se li ne kantis, tiam li imagis la koleran vizaĝon de la patro. Li ne iomete timis. Neniam denove mi reiros, li pensis, neniam, patro, tion nur kredu !

Erik iris, kuris, ĵetiĝis en la tritikon kaj ree iomtempe kuris. Pli kaj pli li rapidis. Tie antaŭe ja videblis jam la preĝeja turpinto. Tie antaŭe estis ja la avino, kaj tie antaŭe estis ja ĉio, kio post li ne estis. Pli kaj pli grande elformiĝis la turpinto, ĝis fine elformiĝis preĝejo el ĝi, kaj laste vilaĝo. Ĉar estis la plej bela vilaĝo en la vasta lando, Erik ankoraŭfoje ekhaltis. Li ĝuis la vidaĵon per apertaj okuloj. Ĉio estis intima al li. Nur poste li vere enpaŝis. Li, la reĝo de tiu ĉi vilaĝo. Li, la reĝo mondampleksa. Ĉu li ne efektive pravis ? Ĉu ne efektive la reĝo de la mondo tiu estas, kiu same kiel Erik ekmarŝas, ek al pli bona vivo ?

La avino scias, kiel akcepti reĝon. Gastojn ŝi invitis, grandajn kaj malgrandajn, sensuajn kaj sandalportantajn. La dombestoj riverencis. Eĉ la koko salutis afable. Kaj tiu, oni povas facile imagi, ne estas gasto, fajfebla proksimen kiel hundo. Mentoteo estis tablenmetita, ĝiskreve estis manĝita. Kaj nur longe post kiam la gastoj adiaŭis, la avino atentigis Erik-on pri tio, ke estas jam malfrue, ke nun li devu hejmen, ĉar alikaze... la patro, la patrino... Erik estu prudenta !

Sed Erik eĉ ne pensis pri tio prudenti. Kio ? Reiri ? Neniam ! Ne al la malica patro. Li nur venu ! Li, Erik, ĉi tie restos. Tio estas lia firma decido.

Vesperiĝis kaj noktiĝis, sekvis tre bela tago, kaj denove vesperiĝis. Kaj alvenis la patro, la fulmotondro, la ŝtormo, la uragano. Li koleregis, ke eĉ avino ne kuraĝis kontraŭdiri ion. Gardante, ŝi stariĝis antaŭ la knabo. Sed la patro kaptis la filon kaj tiris lin per elementa forto kun si. La knabo hirtiĝis kaj kriis. Obstine li rezistis. La patro brutale trenis lin post si. Iom pli malfrue, li kaptis lin ĉe la ŝultroj kaj puŝis lin antaŭen. La giganta patro estis ebria kaj seninterrompe kriaĉis, ke filo hejme havu sian lokon : "Hejme,



friponeo, ĉu vi komprenas tion ? Hejme! ". Erik tremis pro timo kaj plorsingultis. La malica patro ŝanceliĝe troitis malantaŭ li. Pli kaj pli malheliĝis. La tritikotigoj vojrande plu apenaŭ estis videblaj. Eble ankaŭ ili nur kaŝiĝis, ĉar estis dolorige por ili devi observi la eksigon de la reĝo.

"Hejmen, friponeo, hejmen!"

Tiam la fereca dekstra mano de la patro devigis la knabon iri fleksite. Pri eventuala fuĝo ne estis eble eĉ pensi.

"Hejmen ! Hejmen !"

Sub kverko la fereca mano haltigis la knabon. Kaj tiam subite la alia batis fulmorapide sur ties vizaĝon. La knabo havis la senton, kvazaŭ granda ŝtono rompiĝis je lia kapo. Lante li deturnis. Kaj iom poste estis fora stranga tintado en lia kapo, iel tiel, kvazaŭ iu en ege ege granda distanco tintigus fajnajn kaj graciajn sonoriletojn. Per unu fojo li perdis la doloron. Li ekvidis nun originalajn kristalklarajn flavajn steletojn. La steloj saltis tiel gaje antaŭ liaj okuloj, kvazaŭ ili volus okulumi al li : Malgranda Erik, ne malĝoju. Almenaŭ ni, la gajaj steletoj estas viaj amikoj. Ni forprenis la doloron de vi. Se denove iu batos vin, tiukaze ni helpos. Kaj se iu kantos la kanton "Ĉu vi scias, kiom da steletoj staras en la granda firmament", tiam vi scias, kiom da ili estas. Tiukaze vi ne devas unue kalkuli ilin.

Ili pravas, pensis la malgranda Erik. Malĝoje li rigardis al la vizaĝo de la patro. Kaj tiu alrigardis la meditan filon. Konsternite li sobriĝis. Envenis subite en lian kapon, ke ĝis nun li neniam batis la filon.

"Kio estas, filo mia ? Kial vi tiel rigardas al mi ?"

"Patro, ĉu vi scias, kiom da steletoj staras, tie enĉiele?"

"Kial vi demandas ? Kiel mi sciu ? Estas tro multe por kalkuli, filo mia."


"Ne, patro, estas nur malmultaj, tre malmultaj. Mi vidis ilin antaŭ mi, tiel proksime, kvazaŭ ili elsaltus el miaj okuloj".

#### SOLVO DE LA KRUCVORTENIGMO de la n-ro 57

Horizontale : 1. KALENDARO. 2. ALINEO. ER. 3. NT. CO. EG. 4. CILINDROJ.  
5. ERIKO. PLU. 6. LA. TION. 7. INVITAS. 8. ETIKET. NC.  
9. REVOLUCIO

Vertikale : 1. KANCELIER. 2. ALTIRANTE. 3. LI. LI. VIV. 4. ENCIKLIKO.  
5. NEONO. TEL. 6. DO. TATU. 7. ERPIS. 8. REGOLO.  
9. OR. JUNECO.

#### KRUCVORTENIGMO de Sfinksido (s.f. = sen finaĵo)



#### Horizontale :

1. Spronataj ĉiun duan monaton de K-do Kribo.
2. Birdo kun plumtufo sur la kapo kaj... sen vosto. - Planto ĝardene kultivata pro la grandaj flavaj infloreskoj.
3. Sovaĝa internacia pralingvo(\*)
5. Inicialoj de franca poŝt-oficisto, aŭtoro de "Poŝt-telekomunika vortaro" (1934) kaj kies komencliteroj troviĝas sur ĉiuj francaj poŝtmarkoj. - Societparto(\*)
6. Malgrandulino. - Sufikso signifanta ke la preparol-ata objekto enhavas ĝuste ian kvanton tiomfoje, kiom montras la radiko.
7. Iu, kiu faras, ke io funkciu (s.f.). - Egale ĉe

la du ekstremaĵoj. 8. Fartante bone. - Iam, rulita de Paktolakvo (\*).

9. Tiel nomata. - Sankta Petro de Romo havas tian portalon.

10. Naskita en la lando de Danto. 11. Ili venas post ok antaŭaj. - Sufikso montranta kolektivecon.

#### Vertikale :

1. Ŝi instruas fremdan infanon kunvivante kun ĝi (s.f.).
2. Historie aparte grava. 3. Kvietigi, ofte per trompaj rimedoj. - Min kun unu alia. - Konjunkcio. 4. Tia, ke oni povas ĝin malkunigi.
5. Rilata al iu muzikinstrumento. - Mallongigo uzata en vortaroj.
6. Determina adj. - Altestime. 7. Neologismo por sanktolei. - Banale agi, se temas pri grajno, fare de blinda kokino (\*). 8. Iu, kiu prunteprenos ion, pagonte interkonsentitan prezon (s.f.). - Komence. 9. Konjunkcio. - Latino.
10. Kemiaĵo uzata en medicino kaj fotografado (s.f.). - Speco de brasiko simila al kolzo (s.f.).

Klarigoj : (\*) signifas ke la spritaĵo troviĝas en la PIV, ĉu ĉe la difinita vorto, ĉu en iu vorto de la difino mem. Do, bv. konsulti la PIV-n.

H.5. - RF : Robert Filliatre. Trovebla en Enciklopedio de Esperanto kaj en Esperanto en Perspektivo.

Bazesperantemuloj detenu vin !

## KALKULI SEMAJNTAGOJN

Eblas "kalkuli" semajntagon de iu ajn dato. Eĉ sur serioza kaj renoma fakgazeto iam aperis disertaĵo "Kalendar-formuloj": Chr. ZELLER, "Kalender-Formeln", Acta mathematica 9(1887) 131-136. Li traktis ne nur semajntagojn, sed ankaŭ Paskon. Trovi Paskan daton de iu difinita jaro ne estas simpla afero (la tujsekva dimanĉo de la tujsekva plenluno de printempa ekvinokso!), sed trovi semajntagon de donita dato ne estas malfacile. Tial verŝajne multaj sendepende (re)trovis/as/os la formulon de Zeller.

Entjeran parton de  $x$  ni esprimas per  $[x]$ : ekz.,  
 $[3,14] = 3$ ,  $[2,0] = 2$ ,  $[0,999] = 0$ .

Daton laŭ la Gregoria kalendaro ni nomu Gregoria dato (Gd); se januaro kaj februaro estas interpretataj kiel la 13-a kaj la 14-a monatoj de antaŭa jaro, temas pri modifita Gregoria dato (mGd): ekz.,  $1983-12-3 = 1983-12-3(\text{mGd})$  (same!),  $1984-2-7 = 1983-14-7(\text{mGd})$ .

Ni uzu SI kiel semajntagan indicon, kiu, dividite per 7, montras semajntagon per la resto:  $0 = \text{dimanĉo}$ ,  $1 = \text{lundo}$ ,  $2 = \text{mardo}$ , ...,  $6 = \text{sabato}$ .

Post tiuj preparoj la formulo de Zeller tekstas:

$$SI = -1 + t + [2,6 * (m+1) + j + [j / 4] - [j / 100] + [j + 400],$$

kie  $j$  (jaro),  $m$  (monato),  $t$  (tago) estas de responda mGd. (ekz. 1) Naskiĝtago de L.L. Zamenhof: li naskiĝis en 1859-12-3 laŭ tiama rusa kalendaro. Tiu tago estas 1859-12-15(Gd, mGd), tial,

$$\begin{aligned} SI &= -1 + 15 + [2,6 * 13] + 1859 + [1859 / 4] \\ &\quad - [1859 / 100] + [1859 / 400] \\ &= -1 + 15 + [33,8] + 1859 + [464,75] \\ &\quad - [18,59] + [4,6475] \\ &= -1 + 15 + 33 + 1859 + 464 - 18 + 4 = 2356 \\ &= 336 * 7 + 4 \text{ (ĵaŭdo)} \end{aligned}$$

Por  $1900 \leq j \leq 2099$  (t.e., de 1900-3-1 ĝis 2100-2-28 laŭ Gd) la formulo fariĝas pli mallonga:

$$SI = t + [2,6 * (m + 1)] = j' + [j' / 4], \text{ kie } j' = j - 1900.$$

(ekz. 2) 1988-2-29: 1987-14-29(mGd), tial


$$\begin{aligned} SI &= 29 + [2,6 * 15] + 87 + [87 / 4] \\ &= 29 + 39 + 87 + 21 = 25 * 7 + 1 \text{ (lundo)}. \end{aligned}$$

(ekz.3) 1988-3-1: same 1988-3-1 (mGd), tial

$$\begin{aligned} SI &= 1 + [2,6 * 4] + 88 [88 / 4] \\ &= 1 + 10 + 88 + 22 = 17 * 7 + 2 \text{ (mardo)} \end{aligned}$$

## PERIODUJO

Interesatoj bonvolu traduki nacilingven. Dankon!



Periodujo estas horloĝo, kiu akcentas periodojn, anstataŭ pasantajn momentojn en ĉiu horo. La cifereplato estas adaptita al la demando: "En kioma kvarono de la kioma horo ni nun vivas?" (mallonge: Kioma K estas?). En ĝi tago estas dividita en 24-oble 4 periodojn (kvaronojn), kiujn ni nomas per la litero K. La granda montrilo indikas la tioman kvaronon kaj la malgranda montrilo indikas la fakon de tioma horo, en kiu ni vivas; do neniam iun momenton antaŭ erare nomita horo, kiu en nia penso kvazaŭ ne jam komenciĝis. Je punkto NULO (kiam ambaŭ montriloj estas tutsupre) komenciĝas la unua periodo de la unua horo de la tago hodiaŭ (= 1 K 1); post dek kvin minutoj finiĝas ĉi kvarono kaj sammomente komenciĝas la 2a K 1; ktp, la 3a K 1 kaj tuj post la 3a K 1 komenciĝas la 4a K de la unua horo. Kiam poste la granda montrilo atingis la punkton NULO, tiam la malgranda montrilo eniras fakon 2 kaj do komenciĝas 1 K 2, ktp, sekve post 60 minutoj komenciĝas 1 K 3. La lasta periodo de hodiaŭ "4 K 24" (La kvara kvarono de la 24a horo, kiu do komenciĝas tuj post la finiĝo de 3 K 24 kaj finiĝos tuj antaŭ la 1a horo de la nova tago per 1 K 1).

Filozofa Bergson instruis al ni, ke tempo estas dusignifa

ideo. La absoluta sinsekvado konsistas el momentoj. Aro da momentoj estas periodo. Periodo estas limigita daŭro, kiu havas komencon kaj finon (startlinio kaj finlinio). Pro tio ke ankaŭ nia vivo estas limigita daŭro (havinte komencon kaj havonte finon), pensado en periodoj ja estas simpla afero. Tamen ofte, simplaj aferoj ŝajnas malfacilaj por lerni. La kaŭzo estas, ke oni ne pensas antaŭen, do al futuro (futura). Kiel ĉiu vico da periodoj ja la unua periodo komenciĝas je la punkto NULO. La dua jarcento komenciĝis tuj post la finiĝo de la unua. Tria jaro komenciĝas tuj post la finiĝo de la dua, ktp. Same tuj post noktomeza NULpunkto la unua horo komenciĝas kaj post la kvar kvaronoj (1K1, 2K1, 3K1, 4K1) ĝi fariĝas daŭro pasinta kaj subite komenciĝas la dua horo per 1K2-2K2-3K2-kaj 4 K 2 estas la lasta periodo de la dua horo tuj sekvata per 1 K 3. Atentu la malgrandan montrilon, tiam ni pensas futuron ! Daŭre ni vivas en la tria horo dum la malgranda montrilo ne jam preterpasis la trian fakon.

Fervojhorare : "je la 2a horo 8 minutoj" estas momento en la unua periodo de la tria horo ( 1 K 3 ). Dudek minutoj post la dua estas momento en la 2a K 3. Dudek minutoj antaŭ la tria estas EN 3 K 3; kaj ankaŭ dek minutoj antaŭ la tria NE estas antaŭ la tria, sed momento EN la lasta kvarono de ĉi tiu tria horo ( 4 K 3).

Vere ĉi tio ŝajnas malfacila afero ; tamen post alkutimiĝo la simpleco estas tute klara. Ripetfoje : Atentu la malgrandan montrilon kaj pensu futuron !

Kiam ni diras : "Ni nun jam estas manĝantaj", tiam tio signifas : En la periodo, kiu komenciĝis jam antaŭ - kaj finiĝos post la nuna momento ; ĝi transkovras la limon de estonto kaj pasinto. Tago hodiaŭa estas pli granda periodo, kiu transkovras la templimon dum ni parolas. La esprimo "NUNTEMPE" estas periodo, kiu povas transkovri jardekojn, eĉ jarcentojn. Ekz. nuntempe ne plu vivas dinosaŭroj. Nuntempa periodo do povas daŭri longe aŭ mallonge. Periodujo havas en horo kvar kvaronojn, kiuj daŭras 15 minutojn. Minuto ja estas daŭro, sed la hodiaŭa vivo tiom rapidas, ke taga divido per kvaronhoroj donas trankvilan supervidon. La minutsistemo apartenas al la fervojhoraro (momentoj). Per KIOMA K ESTAS ? ni demandas por scii en kioma kvaronhoro ni vivas.

Jen alia demando : Kial enkonduki periodujon ? Mallonge: Por ekzerci futuren-pensadon. Konsciente ĉi pere, ke ĉiu

kvaronhoro estas periodo, kiu komenciĝas per 15 minutoj da tempo futura. Tago komenciĝas per 96 periodoj da 15 minutoj futuraj. Tiu ĉi kvaronsistemo proksimigas la futuron. La futuro estas tuj apud ni ; ĝi ne morgaŭ komenciĝos, sed jam hodiaŭ en ĉiu periodo denove. Futurenpensado plialtigas la nivelon de nia vivo. Algluiĝi al tempo pasinta enuigas kaj tedas.

Per periodujo oni facile povas supervidi apudan daŭron ĝis fiksita momento. Futurenpensado estas plenatenta vivo. Esti konscia, ke oni mem fiksas sian proksiman estonton. Ne necesas rapidi nek urĝi, kiam oni vivas tiele. Por anticipi eventualajn kontraŭargumentojn ni konsciu, ke futurenpensado per fervojhorloĝo estas psikologia memtrompo. Logika ŝajnas, kiam ni pensas per minutomomentoj, sed fervojhorloĝo indikas la momenton post la horo, kiu pasis. La indiko "8 h 55" estas la kvindek kvina minuto de la NAŬA horo. Oni ne plu rimarkas la diferencon inter daŭro kaj momento, ĉar ni alkutimiĝis pensi ne-logike.

Kompreneble, la fervojhorloĝo restas taŭga tempindikilo, ĉar la foriro kaj alveno de trajnoj estas je momentoj.

Per periodujo ni anstataŭigu la ĝeneralan horloĝon, ĉar tiu minutujo akcentas momentojn antaŭ ne-ĝustaj horoj. Periodujo utilas al homoj, kiuj volas transformiĝi al nova paradigmo (pensŝablono).

19840909 (1 K 22)

iea iu

----- EL(L)ITIĜU ! -----  
(konata melodio)

1 matene :

Dormintoj venu el la lito,  
Aperos baldaŭ taga sun'  
Por ĉiu ; ne nur por elito,  
Do levu vin por vivi nun.  
Ĉiu sana kaj precipe forta  
Vi al laboro sur la ter'  
Por ke mizero estu for, ja  
Kaj per laboro al liber'.

rekantaĵo

Nun ni Ne plu hezitu,  
Tag' pasinta estas for.  
La estonton ne evitu,  
Ekiru al labor'.

Sen hezit' kamarado  
Ĉar feliĉaj estas ni.  
Per futuren-pensado  
Al inda hom-soci'.

2 tagmeze :

Ho ĉesu ; haltu en laboro,  
Dum suno estas en zenit'  
Post manĝo jen ripoza horo.  
Al ĉiu ; ne nur al elit'  
Posttagmeze en estont-kvarono,  
Ĉu per labor', ĉu pere sport'  
La distro estas vivbezono,  
Per ĝi al nova mensa fort'.

Nun ni NE plu hezitu,  
Ĉar mateno pasis for.  
La estonton ni profitu  
Kun ĝojo en la kor'  
Sen hezit' kamarado,  
Ĉar feliĉaj estas ni.  
Per futuren-pensado  
Al inda hom-soci'.

rekantaĵo

3 vespere :

He ! jen subiros taga suno,  
Dum brilas lasta ĉi radi'.  
Do uzu ankaŭ tiun lumon,  
Ĉar ja senkosta estas ĝi.  
Periodoj en mallumo restos.  
Nun ripozado via ag'  
Dum dormo la pasinto kreskos,  
Sed post meznokto nova tag'.

Daŭre NE plu hezitu.  
Transformiĝu al progres'.  
La estonton ne evitu  
En tiu viv-proces'.  
Sen hezit' kamarado  
Estas via energi'  
Per futuren-pensado  
Nun elitiĝu ni !

rekantaĵo

F.P.ulo,  
ie, 19841122 (4K19)

**ĈIES VOĈO**

## KVADRATURO

La diskutado inter kvadraturisto(j) kaj kontraŭdirantoj neniam atingos finan solvon, ĉar ili ne parolas saman lingvon, ne parolas pri sama afero, kaj unu(j) kaj aliaj estas pravaj laŭ siaj vidpunktoj.

Pravas la matematikistoj : en tuta rigoro la kvadraturado estas neebla, tio estas nerefuteble demonstrita.

Pravas la kvadraturisto(j), ĉar en la praktiko ni disponas pri proksimumaj valoroj de Pi, kaj la plej komuna konata kaj uzata, 3,1416, sufiĉas por la praktikaj bezonoj en la plimultaj okazoj.

Do ne utilis daŭrigi senfinan argumentadon, kiu restus eterne sensolva kaj senfrukta. Ĉiu restu sur sia firma pozicio, sed agnosku, ke ankaŭ la aliaj estas pravaj en siaj opinioj.

Ofte estas same en diskutadoj inter sinceraj homoj : se ĉiu bonvolus senpasiie konsideri la vidpunkton de la kontraŭulo, oni atingus interkonsenton, en kiu tamen ĉiu konservus sian konvinkon.

Valo.

## POLEMIKO EN LINGVA ANGULO

Noto de la red. :

*Jen plia koincido en tiu ĉi numero. Tiun ĉi supran vidpunkton de amiko VALO oni povos, sen multe da imagemo, apliki al la ĉi-posta polemiko ...*

*Tamen, antaŭ ol lasi la legantaron mem fari al si ideon pri la afero, mi klarigu, ke la du vid-al-vide represitaj artikoloj (p.24/25) aperis origine resp. en la aŭgusta kaj oktobra numeroj de "Sennaciulo". Kdo LENTAIGNE unue, kaj poste, konfirme, k-do WARINGHIEN mem, petis, ke "L!" reproduktu ilin. Kun egala respekto al ĉies vidpunkto, L! do represas... Pri la sama temo sekvas la ĉi-numera kontribuo de nia abonanto L. MIMÓ al sia kutima rubriko.*

Kribo.

## Lingva angulo

### La egaleca komparacio sub la lenso de la analiza skolo

Kiel la alrespondaj en la eŭropaj lingvoj (franca, hispana, germana, laŭ P. Anselme ankaŭ latina, k.c.) la Esperantaj tabelvortoj kun "iel" esprimas ekskluzive la manieron aŭ la samecon rilate al verba ago aŭ verba stato, t.e., la est-manieron, la est-samecon, la ag-manieron aŭ la ag-samecon, dum tiuj kun "iom" esprimas kaj la kvanton kaj la gradon.

Komparo pri maniero: (TIEL aŭ SAME) KIEL. France, TEL, QUE; AINSI QUE; DE MÊME QUE; COMME.

(Atentu ke ĝenerale la demonstrativo estas subkomprenata.) — Via spirito estas kiel abismo: kapturna. = Via spirito estas kapturna (same) kiel abismo. — Ŝi estas eleganta (same) kiel vi. = Same kiel vi, ŝi estas eleganta, sed ne samgrade. — Ili estas kuraĝaj (tiel) kiel ni: kun mezuro. — Ĉu la hotentotoj ne estas homoj (same) kiel la angloj? — Ŝi kantis (tiel) kiel najtingalo, per belaj trioloj. — vi laboras (tiel) kiel azeno; tute sencerbe. — Li dormas same kiel vi, sur du kusenoj. — Vi naĝas (tiel) kiel rano. — Li revis (tiel) kiel infano, infanmaniere.

Komparo pri kvanto: TIOM, KIOM. France, (AU)TANT (DE)...; QUE.

— Oni vidis tiom da ŝafoj, kiom da kaproj. — Tie estis tiom da fromaĝoj, kiom, ĉe ni, da panoj. — Li posedas tiom da domoj kiom ni. (posedas)

Komparo pri grado rilate al verba ago: TIOM, KIOM. France, (AU)TANT, QUE. (Rimarku, ke en tiu ĉi kazo, la kompara adverbo rilatas, ne rekte al la verbo, sed al subkomprenata adverbo, esprimante la gradon, ne la kvanton, kio nerefuteble pruvas ke en neerare uzata Esperanto, kiel en la aliaj lingvoj, oni esprimas la gradon per KIOM, ne per KIEL, kio pli evidentiĝas per komparo kun la antaŭaj ekzemploj.)

— Li dormas tiom, kiom vi, t.e., tiom longe, tiom multe. — Vi naĝas tiom, kiom la ranoj, t.e., tiom multe, kun sama grado de daŭro. — Li revis tiom (multe), kiom infano. — Ili venis tiom, kiom vi, t.e., tiom ofte, kun sama grado de ofteco.

Komparo pri grado rilate al adjektivoj aŭ adverboj: TIOM, KIOM. France, (AUS)SI, QUE.

— Ŝi estas tiom eleganta, kiom inteligenta. — Ŝi estas tiom prudenta, kiom vi. — Ŝi estas bela, sed ne tiom, kiom vi. — Ili malaperis tiom rapide, kiom ili estis aperintaj. — Venu tiom baldaŭ, kiom vi povos.

Memoru: Tuj antaŭ adjektivo aŭ adverbo uzu ĉiam TIOM, ĉar ĝi esprimas la gradon; neniam TIEL.

L. Mimó

## Lingva angulo

### Senlensa rigardo al la egaleca komparacio

Mirigis min la aplombo, kun kiu L. Mimó prezentis en "Senaciulo" de Aŭgusto, kiel evidentajn, sian regulon: "Tuj antaŭ adjektivo aŭ adverbo uzu ĉiam TIOM, ĉar ĝi esprimas la gradon; neniam TIEL!", kaj la zorgo, per kiu oni enkadrigis tiun atestaĵon de pretendemo (nekonscia, mi esperas). Ĉar tiun "regulon" klare kontraŭdiras kaj la Fundamento, kaj la ĝenerala uzado, kaj la logiko.

La Fundamento, en kiu "neniu persono havas la rajton arbitre fari eĉ plej malgrandan ŝanĝon" (Antaŭparolo, la substrekoj estas de Zamenhof mem), instruas la uzadon de la egaleca komparacio en la Ekzercaro, per la frazoj: "ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili" (Par. 11); "kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto" (Par. 17); "oni tiel malhelpis al mi, ke mi malbonigis mian tutan laboron" (Par. 33).

Pri la ĝenerala uzado, mi limigos la citaĵojn al po-du ekzemploj de Zamenhof kaj de Lanti, kiuj bedaŭrinde praktikis, laŭ Mimó, nur "eraran Esperanton": "kreskaĵo tiel bela, kiel neniu alia" (Fabeloj de Andersen, III, p.71); "ili rajdis tiel rapide, kiel ili povis" (saml. p.97); "Zamenhof liveris al la mondo raciigitan lingvon, tiel perfektan kaj vivkapablan, ke neniu el la postnaskitaj surogatoj sukcesis" (Leteroj de Lanti, p.102); "Neniam antaŭe mi estis tiel kortuŝata, kiel okazis kun tiu esperanta balbutanto japana." (Leteroj, p.131). Senutile multigi la citaĵojn. Pri la logiko (tiel ofte alvokita de personoj, kiuj konfuzas ĝin kun siaj antaŭjuĝoj) la esprimo de grado nenial similas al tiu de kvanto: la unue renkontita fizikisto instruos, ke la *kvanto* de varmo estas io tute alia, ol la *grado* de varmo. Grado estas propre ŝtupo, relativa pozicio de io en skalo; kaj tial ĝuste la tradicia Esperanto esprimas ĝin per tabelvortoj, kiuj esprimas ankaŭ la manieron. Malgraŭ la "regulo" de Mimó kaj lia speciala lenso, nek eleganteco nek inteligenteco elvokas ideon pri *kvanto*: ĉiu inteligenta virino klarigos tion al li.

G. Waringhien, no 17296.

## Ekster la erotiko de potenco kaj rego kaj ekster la rutino.

En la numero 56 de "Laŭte", sub la titolo "Esperanto kaj erotiko", en vige ŝerca lingvaĵo, M. Challulau proponas eksterseksan pronomon por la personoj. La temo estas interesa kaj eble mi analizos ĝin alian tagon, sed kio altiris aparte mian atenton estis jenaj du misteraj frazoj, kies signifo estas duba:

"Ĉu virtempo rekte erektiĝas de l'paseo al futuro ? KIEL granda peniso!" kaj "Oni sin lacigas TIEL ĉui eble malsaĝe!"

Simila al ili estas ankaŭ la jena el la robajo 131 (ĉu robajo?) de Prof. Waringhien :

"Ĝoju, ĉar la vualo de mia bonkonduco estas TIEL ŝirita, ke reflekt' ne eblas."

Kion la du aŭtoroj intencis esprimi ? Kion la legantoj komprenis ? Esperanto devas esti lingvo klara kaj simpla kaj regula, sed pri la komparacio kaj preskaŭ pri ĉio estas konceptoj tute kontraŭaj inter si. Konvenus scii, ĉu Challulau konsentas kun Waringhien, ke en E-o la grado estas asimilita al la maniero kaj esprimenda per TIEL, KIEL, aŭ ĉu li opinias, kiel multaj, ke la grado, kiel en la naturaj lingvoj, estas esprimbla nur per la adverba serio derivita de IOM.

Laŭ la Waringhiena koncepto, oni ne povas dubi, ke li volis, kaj verŝajne li volis esprimi ke la vualo estis tre, altgrade ŝirita, kaj laŭ ĝi la frazoj de Challulau esprimus admiron pri la grado de grandeco de la penisoj kaj altgradan, multan lacigan ĉuadon.

Ĉu Challulau volis esprimi tion ? Ĉu vi, leganto, interpretis ke ili volis esprimi tion ? Nu, laŭ la analiza skolo, nur la tabelvortoj kun IOM povas esprimi la gradon, sekve en tiuj frazoj konvenus nur TIOM kaj KIOM, ĉar tiaj, kun TIEL, KIEL, ilia signifo estus ke "la vualo estis laŭlonge, diagonale, zigzage aŭ alimaniere ŝirita", ke "virtempo erektiĝas same kiel granda peniso!" kaj ke "oni lacigas sin tiamaniere ĉui", kio estas tute malsamaj signifoj.

Granda estas la diferenco, kaj grava la demando. Kaj revolucia la konsekvenco : Se en tiaj frazoj oni esprimus la gradon per TIEL, KIEL, kiel kredeble ili intencis, per kio ili mem esprimus la manieron ? Neniel ! Neniel ili povus fari tion, krom per TIEL, KIEL, kaj ĉiu povas kompreni ke ĉi tiuj adverboj ne povas esprimi egale kaj gradon kaj manieron, kaj estus absurde obstini ĉe tio, kiam oni havas por la grado,

kiel en la naturaj lingvoj, TIOM kaj KIOM.

Ekster la erotiko de potenco kaj rego kaj ekster la rutino, racio kaj konstato de faktoj montras jenon :

Egaleca komparo povas esti pri la maniero agi aŭ esti :  
"Si dancas (SAME aŭ TIEL) KIEL feino. - Si estas milde bela, (SAME) KIEL la aŭroro. (Sammaniere, ne samgrade).  
- Vi estas advokato (SAME) KIEL mi ministro."

aŭ pri gradoj inter du agoj aŭ inter du agantoj. (Reale pri subkomprenataj adverboj.)

"Li fordiboĉas TIOM (multe), KIOM li gajnas.

Ni naĝis TIOM (longe), KIOM vi."

aŭ pri gradoj de adverboj :

"Li malaperis TIOM rapide, KIOM li estis aperinta.

Paroli TIOM klare, KIOM prudente. - Vi venis IOMETE pli frue, sed ne TIOM, KIOM ni."

aŭ pri gradoj de adjektivoj :

"Brasiko ne estas TIOM bela, KIOM (bela estas) rozo, sed mi ne scias ĉu rozo estas TIOM nutra."

aŭ pri kvantoj :

"Ni aĉetis TIOM da piroj, KIOM da persikoj."

aŭ pri nenomataj kvalitoj :

"Ni ne estas TIAJ, KIA vi. - KIA la patro, TIA la filo."

Tuj antaŭ adjektivo aŭ adverbo uzendas ĉiam TIOM, kiu esprimas la gradon, kaj neniam oni povas, ne erarante, uzi TIEL.

L. Mimó

## Pri "RACIA KAJ ATEISTA BUDHISMO"

... Kiom mi komprenas nun, la verketo estas vere interesa kaj instrua, sed la budhismo mem ŝajnas nure-praktika, ne-metafizika formo de pesimisma panteismo... Tio, kion la budhistoj nomas "karmo" havas tre fortan similecon kun tio, kion la Okcidentaj panteistoj nomas "Dio" kaj la Orientaj - pli simple kaj eble pli ĝuste - nomas "Tio" kun majuskla litero. Sed la pesimisma doktrino budhisma asertas, ke ĉio - eĉ la animo kaj la personeco - estas nedaŭra kaj pasema, dum la klasika panteismo asertas : ĉio havas samtempe aspekton nedaŭran kaj aspekton eternan, ĉar nenio estas krom Dio, kaj ĉu Tio ne estas eterna ? Sed la eterneco, kompreneble, estas **ekster** la tempospaco, tute ne identiĝas kun senfina daŭro en la tempo !

"Kien iras la flamo de kandelo, kiam oni forblovas ĝin?"  
Laŭ mi, la demando estas sensenca. La flamo estas fenomeno kun difinitaj limoj en la tempospaco kaj "ĉiamdaŭra" esenco

en la eterneco de Dio. "Kien iras la flamo de kandelo, antaŭ ol oni... eklumigas ĝin?". "Kien iras la bildoj de filmo, antaŭ (aŭ post...) la projekciado de la filmo mem?".

"Antaŭ" kaj "Post" ne havas sencon en la eterneco. Ekzistas nur "nun-oj" : pri kelkaj ni memoras, kaj nomas ilin "pasintaj", pri kelkaj ni esperas aŭ/kaj timas, kaj nomas ilin "estontaj". Sed ĉiu nun-o per si mem estas nur "estanta", t.e. "eterna".

La budhismo pravas, kiam ĝi asertas, ke nur la memoro kaj vivo-volo "kuntenas" sennombrajn unuopajn "nun-ojn" en ŝajnan unuon tempospac-fiksitan nomatan "individuon".

Lauracie, la "individueco" kaj "personeco" estas iluzioj, sed certe ne pli ol la aliaj ekzistaĵoj, kaj eble malpli : ĉar la menso povas mem krei iluziojn, tiel aktive partoprenante en la ĉiam-nuna kreado de nia universo.

Kaj ja, la menso povas liberiĝi el la iluzioj, rifuzi plu partopreni la ludon : certe senmensa ŝtono aŭ kverko aŭ suno ne havas alian elekton krom ruliĝi aŭ vegeti aŭ brili laŭ la intrigo de nia universo-teatraĵo.

Budhismo estas la "Vojo" al seniluziigo.

Sed... ĉu ne ekzistas belaj iluzioj, kiuj havas sian valoron, kvankam ili estas kaj restas iluzioj ?

Ĉu oni ne admiras belan pejzaĝon en pentraĵo, belan intrigon en dramo aŭ filmo, kvankam oni bone scias, ke ili ne estas "realaj" ? Kaj, ĉar laŭ la budhisma doktrino (kaj pluraj aliaj) nia kara "memo" estas mem iluzio, oni povas dedukti, ke la "vojo al seniluziigo" kondukas al mem-mortigo.. laŭleĝa.

Ĉar mem-mortigo ne signifas "mortigi sian propran korpon" sed mortigi sian memon - ĝuste laŭ la Esperanta kunmetaĵo. Laŭ mi, memmortigo devus esti rekonata kiel la unua rajto de ĉiu konscia estaĵo : oni ja devas havi la povon forlasi la scenejon, kiam oni estas devigata ludi naŭzan rolon sen ia espero pri plibonigo de la situacio.

Sed ekzistas problemo : la memo de konscia estaĵo NE havas la samajn tempospacajn limojn kiel la korpo ; povas ekzisti vivanta korpo sen plu "memo" aŭ konscio, ĉar la persono jam mortis kaj restas nur la funkcianta organismo; cetere, dum la feta vivo certe ne ekzistas "personeco" en la disvolviĝanta organismo ! La persono, do, naskiĝas post ol sia korpo, kaj kelkfoje mortas antaŭ ol sia korpo (laŭ la "fenomeneca" vidpunkto, kompreneble); ĉu ĝi povus ankaŭ morti post ol sia korpo ? aŭ naskiĝi antaŭ ol ĝi ? Laŭ mia kompreno, la budhisma doktrino tion neas. Ĉu la fantomoj

estas nura superstiĉo, aŭ almenaŭ parto de la homa menso povas iel manifestiĝi per si mem, klare montrante sian abomenon pro abrupte trudita morto ?

Estas pruvite, ke la parapsiĥaj fenomenoj ne havas la samajn limojn kiel la fizikaj ; se "bruegspirito" povas manifestiĝi dum malkvietega adoleskanteo - kaj sen konscia deziro de la persono - kial la sama vivovola bruegspirito ne povus manifestiĝi post la morto de la persono kaj de ties korpo ?

Mi tradukis laŭvorte la fakan terminon "poltergeist" per "bruegspirito" - sed ĝi ne nur bruegas por elmontri sian malkontentecon, sed ankaŭ, foje, agas pli rekte.

Estas fama la proceso kontraŭ la bruegspirito de Anthony Angelo ; en Lynwood (Usono), 1960, knabo estis akuzita pri ĵeto de ŝtonoj kaj aliaj objektoj kontraŭ la aŭtomobilojn vendotajn de lia dunginto - S-ro Mock. Policanoj provis embuski ie kaj tie, por kapti la "ŝtonĵetanton", kiu damaĝis la aŭtojn, rompis la fenestro-vitrojn, ktp. Ili, kompreneble, atente rigardadis la ĉefan suspektiton, Anthony ; sed la ŝtonoj kaj metalpecoj pli kaj pli intense kaj "malice" frapis kontraŭ la sendefendaj aŭtoj. Sed kiam la policanoj - tute sen pruvoj - arestis Anthony, jen la ŝtono-pluvo tuj ĉesis en la aŭto-vendejo. Sed la kulpulo ne estis Anthony - sed nur nekonscia parto de lia menso, t.e. la "ŝtonĵeta bruegspirito". Anthony - konscie KAJ NEKONSCIE - ne elportis la ideon penegi por prizorgi la aŭtojn, lavi ilin, ktp, kontraŭ malmulte da mono ; dum konscie li tamen sin devigis labori en la aŭtejo, lia subkonscio ribeliĝis... kaj montris praktike sian malamon. Feliĉe, ĉeestis la proceson parapsiĥologo, kiu klarigis al la juĝisto kaj juĝantaro, ke Anthony ne estas respondeca pri la faroj de tute normala "ŝtonĵeta bruegspirito" (kiel li prelegis en la juĝejo, ekzistas ankaŭ pli danĝeraj bruegspiritoj, ekzemple tiuj, kiujn oni povus nomi... brulegspiritoj, emaj purigi per fajro la objekto(j)n de sia malamo...).

Dank'al la parapsiĥologo, Anthony estis rekonata "sen kulpa" sed, kompreneble, li ne plu laboris en la aŭtejo de S-ro Mock !

En malmultaj personoj - kaj nur sub la premo de malagra-blaj, neelteneblaj cirkonstancoj, manifestiĝas ia bruegspirito; sed eble, kiu scias? ĝi dormetas en multaj el ni ; bruegspirito estas tro stulta kaj infaneca por kompreni la neceson de memmortigo pro prudenta kaŭzo (ĝi ne estas prudenta!), do ĝi povas sin venĝi kontraŭ la memmortiginto, aperigante

ĝilin kiel "fantomon".

**Do, se vi volas memmortigi, ne uzu ponardon :**

**uzu budhismon !**

**Ĝiz el Lamark**

P.S. Mi komencis per iluzioj kaj finis per fantomoj : ĉu ne dece ?

### BOF ! (3)

Se oni agnoskus la asertojn de K-do Jamo en "Matematikaj Distroj" (2) nur la matematikistoj ne kapablu solvi la plej simplajn problemojn en praktika kampo. Post la problemo pri la cirklokvadrato, kiun ili opinias nesolvebla, nun temas pri la  $3X + 1$  problemo, laŭ ili ankaŭ nesolvebla. Feliĉe (aŭ bedaŭrinde), la Naturo ne rezonas laŭ matematika metodo, kaj pro tio la Mondo ekzistas kun ĉio, kio konsistigas kaj pludaŭrigas ĝin per la  $3X$  kaj la  $1$ , tio estas : per la tri aĝoj de la Tero : la Primara, la Sekundara kaj la Terciara, al kiuj aldoniĝas la Kvatnara, kiu estas la detruanto kaj la pludaŭriganto de la tri antaŭaj. Tiu kvara aĝo konsistas mem el  $3X$ , t.e. : la tri Regnoj, la Minerala, la Vegetala, Animala, al kiuj aldoniĝas la kvara : la Homa, detruanto kaj transformanto de la tri antaŭaj. La Homa regno mem konsistas el tri Rasoj : la "Blua", la Flava kaj la Ruĝa, al kiuj aldoniĝas la Nigra, anarkiiganto de la tri aliaj, el kiu fontas la Blanka, konsistanta el la tri tiel nomataj civilizacioj postbabelaĵ : Sumero, Elamo kaj Asuro, al kiuj aldoniĝas la kvara : Hermeso, kiun mi nomas en "Sur la Monto" "Nigra Suno de Egiptio". El ĝi eliris "la Granda Krokodilo" el Klaŭdjo de Sankta Marteno (Le Grand Crocodile, de Claude de Saint-Martin, Editions de Minuit, Paris) t.e. : la tri antikvaj "viraj" religioj : Ŝintoismo, Hinduismo kaj Mazdeismo (fariĝinta Maniĥeismo), al kiuj aldoniĝas la kvara : la Ozirisanismo, detruinto de la tri antaŭaj, kiu mem naskis la tri modernajn "virinajn" religiojn : Ismaelismo (nun Islamismo), Hebraismo kaj Kristanismo, al kiuj jam aldoniĝas la kvara : Humanismo, nova formo de la antikva Budhismo kaj detruonto de la tri antaŭaj.

Jen kiel, laŭ J. Ŝ., la Naturo solvas la problemon pri  $3X + 1$ . Tion mi jam pritraktis en "Sur la Monto", en "Mem" kaj en "La Tri Romioj" antaŭ dek kvin jaroj. Sed por tiuj, kiuj ne profitis la legadon de tiuj antologiaj pecoj, ignoritaj de ĉiuj, kiuj zorgas pri la bonfarto de sia mensostato, mi aldonas la ĉisuban tabelon, kvara parto de pli ampleksa, kies tri aliajn partojn ĉiuj povas ja facile mem konstrui.

Liberalismo	Araba Imperio (Beduenoj-Hiksosoj)	Islamismo	Arabio
Socialismo	Posthiksosa Egipta Imperio	Hebraismo	Ĵordanio
Komunismo	Romia Imperio	Kristanismo	Grekio
Radikalismo	Usona-Ĉina-Sovetia Kapitalista Imperio	Humanismo	Eŭropo

Ĉu tiuj "ŝtrumpfajoj" konsistigos solvon de la problemo pri  $3X + 1$  por la matematikistoj ? Eble jes, eble ne. Cetere, ĉiuj ja scias, ke J. Ŝ. estas frenezulo, kaj pri frenezaĵoj, same kiel pri gustoj kaj koloroj, ne eblas diskuti. BQF !

Anonima B.G.D. )EYMET(

### NIA DEBATO : HOMOJ kaj AŬTOJ (fino de p. 10)

ne diras al ni : ni nur pagu, kaj ne estu tro scivolemaj. Kiom da pezaj aŭtotransportiloj necesas por porti la ŝarĝon de okdekvagona vartraĵo ? Kiom da aŭtoĉaroj por veturigi la vojaĝantojn de unu sola pasaĝertraĵo ?

Mi ne pretendas, ke la aŭtovojoj estas seninteresaj. Sed mi asertas, ke en multaj okazoj, se oni ĝuste kalkulas ĉiujn elementojn de la kosto, la fervojo venke subtenas la komparon kaj ke malprave oni pli kaj pli fermas kaj malkonstruas utilajn fervojliniojn. Kaj ke finfine, en tiu ĉi lasta kvarono de la XX-a jarcento, la fervojo tute ne apartenas al pasinteco.

Valo

(pliaj opinioj aperos en la venonta L!)

\*\*\*\*\*

Maljunulo rakontas :

### HUNDO

Iam,... kiam mi estis tre juna kaj soifa ricevi diversajn klarigojn pri la ĉiutaga vivo, mi demandis kial la hundo levas la piedon por urini.

Respondi ne estis facila afero.

Fine mi ricevis logikan klarigon.

Antaŭ dekoj da jarmiloj, niaj prahomoj konstruis la unuajn tre primitivajn murojn. La prahundoj pisis ĉe la bazo de la muroj. Ĉi tiu bazo de la muroj fine putriĝis, falis kaj mortigis la hundojn.

De tiu tempo, ĉiu hundo, kiam ĝi pisas, levas unu piedon por protekti sian vivon...

Hodiaŭ oni ne devas ridi, dirante, ke estas hundo, kiu kuraĝigis la evoluon de vojaĝoj inter la steloj...

Mi memoras ekologian ŝtormon okaze de forsendo de hundo al la interstela spaco, nome al la vojaĝo, kiu ebligis iun tagon ricevi de aliaj planedoj kemiajn kombinaĵojn netroveblajn sur nia tero, kaj fariĝontajn medikamentoj aŭ spicoj por aliaĵoj, aŭ ricevi rarajn metalojn (plateno, iridio, osmio, volframo) kreontajn avantaĝojn hodiaŭ ne antaŭvideblajn, ekzemple, la ne kondukto de elektro aŭ likviĝo de metalo kiel hidrargo... --nn--



## NOVAĴOJ ĈE SAT-BROŜURSERVO


\*\*\*\*\*

\* **"Laŭ la fluo de l'interparolo"** de Lucien BOURGOIS. Konversacia gvidlibro Franca-Esperanta. 88 paĝoj DIN A6 Prezo: 6 FF (kun afranko: 10FF). Mendkodo: FI.

Fervora kompilemo trafis ne nur amikon LENTAIGNE, sed ankaŭ Lucien BOURGOIS, kiu, post sia laŭdinda, kaj ja laŭdita, "Proverbaro Franca-Esperanta" (nun elĉerpita, eble reeldonota de SAT-BS), entreprenis arigi alfabetvice tipe francajn, foje slangajn, frazerojn aŭ frazturnojn por liveri al ĉiuj - tiel al la babilemuloj kiel al la tradukemuloj. Li tiel ŝparigas al ni ĉiuj multe da ŝvito, kaj ankaŭ kelkajn erarojn... Tiu poŝlibreto, tute oportuna, estas valora komplemento de **"Tiel diru!"** - kaj reciproke! Mendu senprokraste, kaj preferinde por via tuta E-grupano, ĉar la eldonkvanto estas limigita. Kompreneble, BS-abonantoj en Francio trankviliĝu: la broŝurservo rezervas por ili po unu ekzemplero. Por la neabonantoj restos nur ĉ. 200 ekzempleroj.

\* **"SVEDA NOVELARO"**, trad. de Ferenc Szilágyi. 236 paĝoj DIN A5. Verdire temas ne pri novaĵo, sed pri represaĵo de bonega libro eldonita de Sveda Laborista E-Asocio en 1951. Vendprezo: 30 FF. Mendkodo: SN. Vendkondiĉoj: Asociaj libroservoj prefere mendu rekte al SLEA (adreso de Pelle Persson, Svartviksvägen 14, S 123 52 FARSTA), kiu disponas pri 500 ekzempleroj, dum la broŝurservo, kiu disponas pri nur 200 ekzempleroj, liveras al BS-abonantoj kaj unuopaj mendantoj. BS-abonantoj, kiuj jam posedas la libron kaj tial ne volas ricevi la novan eldonon, bonvolu okaze sciigi tion al BS. Kompreneble, pri SN plu validas/valoras la recenzo publikigita de "Sennaciulo" en 1951 okaze de la unua eldono. Jen ĝi:

Tiu libro prezentas al ni elekton de 20 noveloj, kiujn la tradukinto faris el la verkoj de svedaj laboristaj verkistoj. Tial ĝi estas duoble valora, kaj el klasa, kaj el literatura vidpunkto. Unuflanke, ĝi montras, per efika pruvo, ke la kulturo kaj arto ne estas privilegio de la burĝa klaso: "Ĉiuj tiuj verkistoj, diras la antaŭparolo, estas hieraj pri sia malriĉa deveno kaj pri la fabrik-aŭ ter-laborista medio, kie ili komencis". Kaj oni sentas, legante tiun belan antologion, ke ĝuste pro sia fideleco al sia klaso, tiuj verkistoj donis al siaj noveloj tute apartan tonon, ian aŭtentan originalecon, ne ofte atingitan sur tiu tereno. Dank'al ili, ni partoprenas la suferojn la maldolĉaĵojn, kelkafoje ankaŭ la feliĉojn de tiuj humiluloj kaj simpluloj, kiuj, malgraŭ la malsameco de grundo, de klimato kaj de moroj, finfine tute similas niajn sam-



ЦЕНТРАЛЬНЫЙ ОПТАН МИНИСТЕРСТВА ОБРОПНЫ СССР

Гарантія авторитету  
с 1-го издания 1974 года  
С НОВЫМ ГОЛОМ  
ТОБАРМІЛИ  
1984  
Воскресенье  
№ 1  
Литва J. K. K.

За редакцией Советского Подполья!

landanojn. Proletoj el ĉiuj landoj... Aliflanke, la mondliteraturo riĉiĝas ĉi tie per neordinara akiraĵo: tiujn novelojn de svedaj aŭtoroj elektis unu hungaro, kiu tradukis ilin en Esperanton: ĉu eble trovi pli brilan ateston de la utilo kaj de la digno de nia lingvo? La gusto de F. Sz. estas sendiskute kaj plene laŭdinda: neniu el la elektitaj pecoj estas banala, aŭ rompas la altan kvaliton de la tutaĵo. Ĉiu el ili, ĉu ili rakontas pri juna unua amo, pri morto de hakisto en la senhomaj arbaregoj, pri forkuro de juna virino kun la patro de sia edzo, pri la rehejmiĝo de liberigita ŝtelisto aŭ pri aventuro de la antikva Homero, alportas freŝajn vivbildojn, kaptitajn de lertaj okuloj kaj vortigitajn de lerta plumo. La kunaĵo de tiuj dudek pecoj estas vere ĉefverko de la laborista literaturo.

La traduko estas bonega. Abundas la trafaj, sukaj esprimoj, kiuj estas tiel necesaj por difini la ĉiutagajn aferojn, kaj kiuj tiel ofte mankas al nia tro abstrakta, tro intelekta vortaro: "krudvegetarano, ladglaso, ventimuna jako, krii al iu envenu-on" ktp. Kaj tamen ne mankis la obstakloj sur la vojo de la tradukinto: tiuj modernaj verkistoj uzas stilon tre personan, ofte abruptan aŭ trivialan: tiujn ecojn Szilágyi preskaŭ ĉiam sukcesis redoni en nia lingvo en kontentiga maniero. Kompreneble tio kelkfoje igas la tekston pli malglata por la rapidema aŭ novebakita leganto: sed, kiel iam rimarkigis Zamenhof, se komencanto volas trovi facilan legaĵon, li ne elektu tro literaturan verkon. Nenio estus pli simpla, ol eviti ĉiujn art-problemojn kaj dilui la drastajn esprimojn de pitoreska paĝo en senkoloran, sengustan frazaron. Sed ĝuste tio estas la granda merito de tradukistoj, kiel Szilágyi, aŭ kiel Faulhaber (mi ekspensas pri la bela traduko de "La nevenkebla ĝeno"), kaj la granda servo farita al Esperanto, ke ili ne rifuzis ataki malfacilajn tesktojn kaj penis riĉigi nian lingvon per kuraĝa alfronto de vortaraj aŭ stilaj rafinitaĵoj. Pro tio ni devas ilin danki kaj honori.

G. Waringhien.

Krom tiuj du libroformaj eldonaĵoj, SAT-Broŝurservo presis je la jarturno la vivoplenan, intereseĝan, kaj riĉilustritan "Villandraut-jurnalo"n verkitan de SAT-Junulfako post ĝia sukcesplena renkontiĝo antaŭkongresa en Ĝirondio fine de julio 1984. Ankaŭ tio estis presita en limigita kvanto! Sin turni al SAT-Junulfako, 67 av. Gambetta, F 75020 Paris. La ĉi-meza ilustraĵo apartenas al tiu Villandraut-jurnalo!

## BILANCO DE SAT-Broŝurservo por 1984

(tute senpretende, neortodokse starigita)

Vendoj - Provizoj	44721,00	Eldonkostoj	20410,44
Donacoj	998,18	Afranko	4903,00
Diversaĵoj	920,30	Diversaĵoj (transĝiroj)	3614,20
SUME :	46639,48	SUME :	28927,64

La jara saldo estas : + 17711,84 | Estas do relative multe da mono en la ka-  
 Fine de 1983 estis : 6196,58 | so. Verdire, ĉ. 11829 estas mono troviĝ-  
 Nun, en la kaso : 23908,42 | anta en la kontoj de monprovizintoj, dum  
 aliflanke restas pagotaj al BS 6188 FF de broŝurmendintoj. Do, ĉ. 15267 FF  
 estas neta posedaĵo de la Servo. Tio utilos por aĉeti paperstokon kaj diversajn  
 necesaĵojn. Bedaŭrinde, en Francio ne eblas al "neprofitcelaj" asocioj loki monon  
 en bankon por ricevi interezon. Sed eble ni trovos solvon venontjare...

\*\*\*

Mi projektas aperigi, eble suplemente en L!, plej detalan katalogon, kun  
 listo de ĉiuj iam eldonitaj broŝuroj, elĉerpitaĵoj, ktp, kaj, eble, se pigro ne  
 venkos, ankaŭ historion de la broŝurservo de la komenco ĝis...nun.

## BILANCO DE "Laŭte!" por 1984

Abonoj - Donacoj	11052	Eldonkostoj	5620,80
		Afranko	2399,37
SUME	11052	SUME :	8020,17

La jara saldo estas : + 3031,83 | La donacoj inkluzivas 1500 FF,  
 Fine de 1983 estis : 5125,53 | donacitajn de la Laborista E-Grupo  
 Nun, en la kaso : 8177,36 | en Ĝirondio.

**Abonantaro** : 383 abonoj en 1984 (+ 15 kompare kun 1983). 35 % troviĝas  
 ekster Francio. 27 abonoj estis donacitaj al nepagipovaj legantoj. Iomete mal-  
 akceliĝis la progresado de la abonombro. Ĉar la nesuperebla eldonkvanto (500,  
 do ĉ. 450 abonoj) ne estas atingita... restas ankoraŭ iom da loko por novaj  
 legant(in)oj !

**Amplekso** : 262 paĝoj (Tujare aperis ne la kompleta adresaro de la abonant-  
 aro, sed nur suplemento al la Adresaro 1983. Ĉi-jare, la ĝisdatigita adresaro  
 aperos en julio). Kribo

1/2\*\*\*\*\*

En la sekvantaj paĝoj jen la fino de nia "felietono" "**ALVOKOJ AL LA HOMA  
 KONSCIENCO**". En 84.02.01, 11 personoj aprobis la skizon pri la projekto  
 "INDIVIDUAJ LIBEROJ", kies ideo estis diskonigita la 24an de decembro  
 1982. En 84 02 01, 5 personoj kaj 2 asocioj aprobis la ideon pri la projekto  
 de KODO DE KOMUNIKA DEONTOLOGIO, diskonigita la 19an de septembro  
 1983. La legantoj, kiuj deziras sendi sian aprobon, siajn sugestojn aŭ kritikojn  
 pri la tuta dokumentaro bonvolu sin turni al : A.P.J.R., 80 rue des Noyers,  
 F 77390 VERNEUIL L' ETANG, Francio. Dankon !

## PROJEKTO DE UNIVERSALA ASOCIO POR LA ANTAŬENIGO DE LA INDIVIDUAJ LIBEROJ (U.A.A.I.L.)

### I. ANTAŬPAROLO

- 1\* En ĉiuj homaj socioj oni proklamas, opinias, scias aŭ  
 diras, ke ĉiuj homoj profitas liberojn, sen precizigi, ĉu  
 temas pri la individuaj liberoj, pri ĉiuj aŭ pri nur iuj  
 inter ili kaj eĉ se tiuj individuaj liberoj estas nur la privi-  
 legioj, kiujn ĝuas nur iuj anoj de tiuj socioj.
- 2 Liberoj, ĝojoj de tiuj, kiuj povas agi, ĉar ili estas inte-  
 ligitaj aŭ potencaj, sed ankaŭ deziro de tiuj, kiuj  
 volus agi, sed ankoraŭ trompitaĵoj de tiuj, kiuj,  
 pro diversaj kialoj, ne povas agi : infanoj briditaj de sia  
 patro; junaj viroj kaj virinoj briditaj de la homamaso de  
 tiuj, kiuj posedas peceton da libero kaj kiuj, oftege, prave  
 timas perdi ĝin (ekzemple : la libero labori); malriĉuloj  
 senpovaj pro sia malriĉeco; civitanoj konsiderataj kiel  
 neplenaĝaj de la hierarkiaj socioj; malsanuloj kaj malsat-  
 uloj, kiuj alkroĉiĝas al la plej mizera libero vivi.
- 3 Ĉar registaro, kiu ajn estu, asignas al si komision  
 firmtenin unuecon de la **socio** kaj kunordigi la diversajn  
 formojn de vivo, kiujn tiu socio ebligas, ni ĉiuj devas  
 agnoski, ke ĉiu registaro estas "**socialista**", kia ajn estu  
 ĝia nomo.
- 4 Tamen, tiu termino "socialista" devas esti precizigita  
 pro du kialoj :
- 5 a) unue, ĉar la socialistaj sistemoj estas diversegaj,  
 eĉ kontraŭaj en siaj teoriaj konstruoj : socialismoj ŝtata,  
 kolektivistaj, monarkistaj, respublikaj, naciaj, agraraj,  
 prudonaj, fabianaj, teokratiaj, ktp;
- 6 b) poste, ĉar la politikaj sistemoj laŭdire "socialistaj"  
 nun ekzistantaj en la mondo estas fakte fremdaj al la  
 individua volo de justeco, de egaleco kaj de interhelpo,  
 kiu estas la ekzistokialo de la teoria socialismo. Do oni  
 povas nur erari pri la socialismo, se oni komprenas ĝin,  
 prenante kiel ekzemplon aŭ modelon nur unu el tiuj  
 strukturoj.

\* ... por faciligi la transporton de viaj rimarkoj.

- 7 Do oni povas difini la diversajn nunajn politikajn reĝimojn "socialistajn", ĉar ili volas neprigi la progreson de la homaj grupoj, enkorpigante laboron, inventemon, riĉecon kaj diversajn havaĵojn produktitajn en tiu socio, al la entuta komunumo. Sed ĉu tiuj grupoj servas la individuojn, kiuj konsistigas ilin, ĉu ili volas servi ilin, ĉu ili fordonas sin al unika komisiono servi ilin ? Aŭ ĉu la individuoj ekzistas nur por pravigi la vivon de grupoj, kiuj absorbas la plej bonon de la "progreso" ?
- 8 Ekzistas reale nur du manieroj regi la sociojn :
- 9 a) aŭ, se oni akceptas, ke la registaro konsistas el personoj plialtigitaj pro sia scio, sia singardo kaj sia digno super la civitanoj, kiujn ili regas. Tiamaniere, la aŭtoritato de tiu registaro estas samtempe necesega kaj bonfara. Tiu aŭtoritato rezultas de nenia konkreta realeco sed de abstrakta aŭ teoria principo : la Tradicio, la Demokratio, la Popolo, la Historio, la Partio, la Nacio, ktp. Ĝi povas dependi de diigita individuo : la Patreto, la Mastro de la popoloj, la Patro de la popoloj, la "Führer", la "Duce", la Granda Stiristo, la Profeto, la Elektito de Dio, la Superega Batalanto, la Ajatolao, ktp.
- 10 b) aŭ, se oni akceptas aŭ volas, ke la regantoj ne distingu sin de la regatoj per apartaj majstraj kvalitoj. Tiaokaze, la regantoj estas elektitaj de la komuna opinio, kies esprimo estas la libera batalo garantiata per diversaj reprezentaj rimedoj. Tiukaze, regi signifas preni la oportunajn decidojn, kiuj koncernas la vivmanieron kaj la kunlaboron de personoj egalaj pri rajtoj. La decidoj estas prenataj sub ĉies kontrolo dank'al la libero de informo kaj de opinioj.
- 11 Kun tiu dua maniero regi la civitanojn, oni povas kompari, sur la familia tereno, aŭ la aŭtoritaton de patro, kiu akceptas dividi ĝin tute kun siaj infanoj, ĉar li komprenas la lecionon de ilia deziro pri libereco, aŭ la aŭtoritaton de infanoj, de gejunuloj, kiuj rifuzas, ke ilia patro manifestu aŭtoritaton superan al la ilia, kio ne malpermesas akcepti la lecionojn de lia sperto.
- 12 Ekzistas probable ankoraŭ kelkaj triboj de liberaj homoj, kiuj vivas en lokoj privilegiaj pro la klimato, la abundo de la natura provianto, la natura respekto de la aliuloj, la simpleco de la vivo. Sed la homoj, en sia grandega pli-

multo, uzas nur liberojn partajn, nombre variigeblajn laŭ la landoj, ĉar la socialismo prezentas naturan inklilon al patronismo, ĉi tie politika esprimo de la netoleremo, kaj ĉar la vivo en gravaj grupoj trudas limigojn al la uzado de la liberoj.

- 13 La demando, kiun ni metas al ni estas do : ĉu tiuj limigoj estas pravigitaj, akcepteblaj, akceptitaj de ambaŭ kontraŭuloj : tiu, kiu limigas la liberojn; tiu, kiu eltenas tiujn limigojn ? Tiu demando estas metita sub diversaj formoj tutlonge de la homa vivo : kiuj estas la pravigoj realaj, validaj aŭ troaj de la puno aplikita al koleĝiano, de punoj registritaj en la kodoj, de la propatria morto-devo ?

## II. CELOJ DE U.A.A.T.L.

### A. KOMENTO

- 14 La UAAIL grupigas en siaj sekcioj PERSONOJN kaj ASOCIOJN, kiuj nur libere aliĝas al ĝi.
- 15 Ĝia esenca celo estas permesi al ĉiu taksi sian propran vivon surbaze de liberoj, kaj tiun de aliuloj - eĉ de niaj parencoj - sur tiu sama bazo de libero, instigi la aliulojn pripensi la kondiĉojn de siaj liberoj, mezuri ilin, postuli ilin, se ili opinias pravigita tiun postulon, kompreni, akcepti aŭ rifuzi ties limigojn.
- 16 La UAAIL do volas doni al ĉiulandaj individuoj, eventuale grupiĝintaj en asocioj, la okazon scii :
- 17 a) ĉu ili volas esti liberaj;
- 18 b) kiel ili konsideras sian kunlaboradon kun la aliaj individuoj de sia socio, por ke ĉiuj estu egale liberaj;
- 19 c) kiel ili konsideras la konekzistadon de siaj individuaj liberoj kun la aŭtoritato kaj potenco de sia registaro;
- 20 d) kiel ili komprenas kaj organizas la konekzistadon de siaj individuaj liberoj kun tiuj de estuloj, laŭ iu aŭ alia maniero subaj al ili : siaj infanoj, siaj lernantoj, siaj laboristoj kaj oficistoj, siaj regatoj.
- 21 En iuj ŝtatoj, la registara propagando, apogata per la amaskomunikiloj, instigas la ŝtatanojn de la koncernaj ŝtatoj kredi, ke ili estas la plej liberaj homoj en la

mondo. La regantoj tiel flatas la regatojn por igi ilin pli obeemaj. Por kontroli la eventualan pravecon pri tiuj kredoj, la anoj de UAAIL opinias, ke ilia esenca kaj simplega tasko estas kaj estos kompari kiamaniere la individuoj uzas ĉiujn liberojn en ĉiuj landoj. Ekzemple en via lando, ĉu via libero migri interne kaj ekstere de ĝiaj landlimoj estas reala, kompleta aŭ limigita? Kaj kiuj pravigoj estas donitaj por la starigo de tiuj limigoj?

- 22 Tiu esplorado de la liberoj estas farita laŭ justeca kaj frateca spirito al ĉiuj, kiuj disponas malpli da liberoj, postuli la disponigon de la liberoj, kiujn ili ĝuas ne plene, aŭ ne tiom, kiom la plej liberaj homoj.

#### B. STATUTO DE U.A.A.I.L.

- 23 **Paragrafo 1a.** La UAAIL estas universala asocio, kies anoj - kiaj ajn estas iliaj raso, nacieco, kredoj, lingvo aŭ dialekto, socia situacio - klopodas koni kaj diskonigi al ĉiuj homoj, antaŭenigi la liberojn de individuoj izole konsiderataj.

- 24 **Par. 2a.** La UAAIL enhavas sekciojn de anoj, kiuj grupiĝas laŭ siaj anoj kaj la ebloj establi tiujn sekciojn.

- 25 Anoj de UAAIL povas, laŭplaĉe, aliĝi al sekcio aŭ rekte al UAAIL.

- 26 **Par. 3a.** La celoj de UAAIL-anoj estas nur praktikaj. Ili konsistas:

- 27 3.1. establi kaj ĝisdatigi liston de la individuaj liberoj praktikataj en ĉiuj landoj, iam kaj nun: esencaj, precipaj kaj akcesoraj liberoj, ekzemple libero manifesti sian kredon aŭ nekredon, agi, alilokiĝi;

- 28 3.2. establi tiun liston per diversaj manieroj, ekzemple laŭ la diversaj praktikaj aspektoj de la vivo: loĝado, nutrado, kuracado, laboro, translokiĝo; poste sociaj: naskiĝo, familia vivo, edukado, instruado, profesia vivo, geedza vivo, maljuniĝo, morto; poste moralaj: opinioj, esprimo, toleremo legado, informo, klarigo, arta vivo, doktrinoj moralaj, religiaj, filozofiaj;

- 29 3.3. esplori, por ĉiu libero, kion ĉiu homo povas fari kaj kion li povas rifuzi fari, surbaze de sia rajto kaj de rajto de aliaj individuoj praktiki tiun liberon kaj aliajn liberojn;

- 30 3.4. establi kaj ĝisdatigi liston de rimedoj agnoskitaj en la diversaj landoj por praktiki la individuajn liberojn, kaj de rimedoj, kiuj permesas la limigon de tiuj liberoj;

- 31 3.5. publikigi tiun liston de la individuaj liberoj kaj rimedoj por praktiki ilin, kaj diskonigi ĝin tutmonde;

- 32 3.6. kontroli, ĉu la universalaj deklaroj de homrajtoj, de infanrajtoj, ..., la apartaj ĉartoj: de malsanulo, ....., inkluzivas la uzadon de individuaj liberoj, kaj estas adoptitaj en la diversaj landoj, kaj ĉu tiu adopto estas konkretigita per leĝoj aplikablaj kaj aplikataj;

- 33 3.7. peti ĉiun gvidanton, registon aŭ instanc-direktanton de ĉiu lando:

- 34 3.7.1. efektiviĝi per aktoj leĝodonaj aŭ/kaj reglamentaj la individuajn liberojn agnoskitajn en la konstitucio de sia lando kaj en rajtodeklaroj kaj ĉartoj, kiujn ŝtatanoj ne aŭ ankoraŭ ne uzas malgraŭ tio, ke ili estas leĝe agnoskitaj;

- 35 3.7.2. enskribi en leĝoj kaj/aŭ apliki ĝenerale aŭ en precizaj kazoj la individuajn liberojn praktikatajn pli en aliaj landoj ol en la propra.

- 36 **Par. 4a.** Ĉar la UAAIL celas konsciigi la individuojn pri la reala amplekso de sia rajto al liberoj, rezultos de ĝia pligrandigo, eĉ nur en mondparto, ke, en tiu parto, ĝi malpezigos la rimarkindan mision de la asocioj, kies anoj batalas por la defendo de subprematoj: kvara aŭ triamondistaj asocioj; Amnestio Internacia; ligoj pri homrajtoj, infanrajtoj; Kuracistoj sen landlimoj, ktp.

### C. RIMEDOJ DE U.A.A.I.L.

- 37 **Par. 5a.** Kotizo ne estu fiksita por aparteno al la UAAIL aŭ al unu el ĝiaj sekcioj, kiuj ricevos nur donacojn regule konstatatajn, kies karaktero eventuale anonima devos esti respektata. Tamen, kotizo povos esti fiksita en landoj, kie la priasocia leĝaro malpermesas la pagon de donacoj.
- 38 **Par. 6a.** La UAAIL kaj ĝiaj sekcioj konsistigas laŭplaĉe asociojn deklaritajn aŭ ne, laŭ la leĝaro de la lando, kie ĉiu havas sian sidejon.
- 39 **Par. 7a.** La UAAIL-anoj uzas la nacia(j)n aŭ etna(j)n lingvo(j)n aŭ la dialekto(j)n inter si, kaj en siaj rilatoj kun alilandaj UAAIL-anoj, kie estas parolata(j) tiu(j) lingvo(j) aŭ dialekto(j). Por aliaj interlingvaj rilatoj, esperanto estas rekomendita.

Alvoko diskonigita en la 82.12.24  
Ĝisdatigo n° 4 : 84.01.22

La.....

Por UAAIL aŭ la sekcio :

Sendinto : koordinatoj  
de la PERSONO,  
aŭ stampo de la ASOCIO

Grupo

KODO

DE KOMUNIKA DEONTOLOGIO

Universala grupo  
de personoj kaj asocioj  
aktivantaj por starigi  
kodon  
de komunika deontologio

### PROJEKTO PRI KODO DE KOMUNIKA DEONTOLOGIO


#### A. PREZENTO

##### I. DIFINOJ

- 1\* En la projekto ĉi tie prezentita de KODO DE KOMUNIKA DEONTOLOGIO, konvenas tute komence rekoni kaj difini ĝiajn precipajn protagonistojn kaj la rezulton de ties rilatoj.
- 2 Ni distingas tri protagonistojn : la PETANTON, kiu petas komunikadon. Tiu petanto povas sin turni aŭ al PERANTO, aŭ al AMASKOMUNIKILO, aŭ al peranto kaj amaskomunikilo.
- 3 La petita peranto enketas pri la peto kaj povas eventuale peti la helpon de amaskomunikilo(j).
- 4 Ekzemploj : se vi skribas persone al via deputito, al ministro, ĵurnalisto, ktp, tiuj personoj fariĝas viaj perantoj.
- 5 Ĉar la ĴURNALISTOJ estas la plej konataj perantoj, konvenas doni nian difinon pri ili.
- 6 La petita amaskomunikilo ekzamenas siaflanke la peton kaj ĝi povas same peti la helpon de peranto.  
Ekzemploj : se vi skribas nepersono al ĵurnalo, al la justico; se vi telefonas al la policejo, al fajrobrigado, ktp, tiuj moralaj personoj fariĝas viaj amaskomunikiloj.

\* La alineoj estas numeritaj por faciligi la transporton de viaj rimarkoj

- 8 La peranto aŭ/kaj la amaskomunikilo deklaras la media-  
cian KOMUNIKON atendatan de la petanto.
- 9 Por eviti ripetojn, la precizaj difinoj de ĉiu el la prota-  
gonistoj kaj de la rezulto de ties rilatoj estas donitaj  
ĉi-poste en la projekto de tiu kodo (vidi : B, ekde p.50)
- 10 Skemo :



## II. ANTAŬPAROLO PRI LA AMASKOMUNIKILOJ

- 11 Oni povis difini nian epokon kiel tiun, en kiu la informo  
ĉesas dependi de la evento : ĝi estigas ĝin, modlas ĝin,  
plilongigas ĝin aŭ kontraŭe ignoras aŭ sufokas ĝin.  
La daŭra aliro al vasta opinio permesas al amaskomunik-  
iloj (precipe ĵurnaloj, radio, televido, gazetaro, kino;  
cirkuleroj de grupoj industriaj, financaj, sindikataj, ktp)  
kondiĉi nian sperton de la aĵoj kaj niajn reagojn al  
faktoj travivitaj ekstere de ĉiu persona kontakto kun ili.
- 12 Kiel la ĵurnalistoj ŝatas proklami tion, la amaskomunik-  
iloj faras kaj malfaras la eventon.
- 13 Sen demandi al ni, ĉu la amaskomunikiloj prave fanfa-  
ronas pri tio - ĉar la produktoj de ilia "industrio" ne  
brilas kutime pro sia alta kvalito - ni povas tamen deziri  
ricevi de tiuj amaskomunikiloj, "perantoj", iom utilan  
produkton, kiu respondu al kondiĉoj de ekzaktecio, de pre-  
cizeco kaj de signifo, kiuj permesas integri ĝin legitime  
al nia perspektivo pri la mondo, la homoj kaj la aĵoj.
- 14 La profito de la petanto devas regi la kvaliton kaj la  
distribuon de la informo. La informita individuo rajtas  
postuli : unue, ke oni informu lin pri faktoj realaj, kon-  
trolitaj, koncerne tiun aŭ alian aspekton de aĵoj proporcie  
kiel tiu aspekto rilatas kun liaj profitoj profesiaj, inte-  
lektaj, vitalaj. Due, la informita individuo rajtas komuniki  
sian taksadon, sian juĝon, la decidojn, kiujn li prenas,  
kaj la agojn, kiujn li entreprenas koncerne tian aŭ alian  
donitaĵon de la informo; li rajtas postuli de tiuj "perantoj"

ke ili ludu sian rolon propagante lian propran informon,  
laŭ iu aŭ alia maniero, en la ĉeno de komuniko tiel  
establita.

- 15 Unudirekta informado, kiu adresas fermitan mesaĝon,  
kies principoj kaj ligiloj elglitas el ĉiu analizo, el ĉiu  
ekzameno, el ĉiu korektado fare de la uzanto estas, en  
la strikta senco de la termino, informo nula. La ele-  
menta 'feed back'<sup>(1)</sup> postulata de rudimenta maŝino tute  
mankas al ĝi.
- 16 Tamen, ni havas la kutiman eksperimenton, ke tiuj  
du elementaj kondiĉoj de la informo :  
- la individuo devas esti ĝuste informita,  
- ĝia respondo devas esti publikigita,  
kiuj reprezentas la profiton de la individuo, estas  
kutime kaj, ĝuste ŝajnas, sisteme malestimataj. Ĉiu  
povas konvinkiĝi pri tiu stata fakto per sia persona  
eksperimento.

- 17 Se multnombraj petantoj alvokas, apelacias la perant-  
ojn kaj amaskomunikilojn, estas tamen komune akceptite,  
ke ne la perantoj, ne la amaskomunikiloj estas larĝe  
respektataj, kiel ili devus normale esti. Tiu konstato  
estas imputebla al tiu fakto, ke multaj petitaj mediacioj  
ne respondas al la opinio, kiun oni kutime havas pri la  
justico, kio estas rapide kontentigi la bonan rajton.  
Unue, ĉar granda parto de petoj ne finatingas mediacian  
komunikon, ĉar ne ĉiuj perantoj kaj precipe amaskomu-  
nikiloj konscias pri sia devo, kiu estas enketi pri peto,  
tiel longe kiel necesas, por ke ĝi finatingu mediacian  
komunikon. Aŭ ili forlasas tutsimple peton, aŭ ili  
eldiras mediacian komunikon neadekvatan aŭ nekomple-  
tan aŭ neaplikeblan.
- 18 Rezultas foje kontraŭagoj, kiujn la pasivaj civitanoj  
ne komprenas kaj kiuj estas prezentitaj kiel revenĝoj,  
malesperaj aŭ eĉ teroraj, foje sangaj agoj.

- 19 Jen kelkaj pruveblaj ekzemploj.

## III. EKZEMPLOJ

### KIUJ PRUVAS NECESON KAJ URĜECON STARIGI KODON DE KOMUNIKA DEONTOLOGIO

- 20 1. La prezidanto de deklarita asocio skribas al minis-  
troj, prezidento, pri temo, kiu respondas al statuto de  
lia asocio. Li ne ricevas respondon, aŭ li ricevas pli aŭ

(1) = retroago = komando de sistemo per la reenkonduko en tiun  
de la rezultoj de ĝia ago.

malpli malfrue respondon, kiu estas aŭ simpla ricevavizo, aŭ prokrastiga respondo aŭ favora respondo, sed kiun ne sekvas la atendita rezulto.

21 2. Ĵurnalo publikigas artikolon de iu persono, ĵurnalisto aŭ simpla korespondanto, kiu anonime atakas asocion ĉe ĝia honoro. La prezidanto de la asocio ne povas obteni la publikigon de lia respondo en tiu ĵurnalo, ĉar la ĉefredaktoro eĉ ne respondas al li.

22 3. Ĵurnalo publikigas asertojn objekte mensogajn, kiuj koncernas tian aŭ alian problemon, ekzemple tiun pri la sistemaj radiologiaj ekzamenoj. La prezidanto de la asocio por protekto kontraŭ la jonigantaj radiadoj tiam skribas al tiu ĵurnalo kaj pruvas, ke tiuj asertoj estas mensogaj. La ĵurnalo ne publikigas tiun respondon, kio permesas supozi, ke ĝi tiel riskus malkontentigi la komercistojn de radiologiaj aparatoj kaj filmoj, kiuj aperigas reklamajn anoncojn en tiu ĵurnalo.

23 4. Multnombraj ĵurnaloj publikigas preskaŭ samtempe, anonime aŭ sub la nomo de ĵurnalisto, artikolon, kiu originas de gazetagejo kaj kiu entenas neekzaktajn asertojn aŭ kiu donas nur la bonajn flankojn de malkovro, elpenso, tekniko (ekzemple, la benefikojn de nukleaj centraloj). Tiu artikolo estas provizita senpage aŭ eĉ pagita al la agentejo fare de iu organismo, kies nomo ne estas indikita de la agentejo kaj ne reproduktita de ĵurnaloj. Individuo aŭ la prezidanto de asocio, se li respondas pri tiuj asertoj, objekte, ne vidos publikigita sian respondon. Oni respondas al li iaforte: "Vi ne povas pretendi pro "respondrajto" ĉar vi - aŭ via asocio - ne estas nome citita".

24 5. Aŭskultinto-spektinto skribas al TV-stacio por peti tekston aŭ videokasedon de elsendo pri kiu li deziras respondi. La stacio respondas al li, ke neniu kopio estas farita. Se tiu aŭskultinto-spektinto kopius permagnetskopon, oni eble respondus al li, ke tia kopio ne havus pruvan valoron ĉe tribunaloj.

25 6. Kuracisto skribas al vicministro de la ŝtata funkcio kaj de la administraj reformoj, iniciatinto de reformo favore al la ŝtatoficistoj konsiderataj kiel "ŝtatoficistoj-ŝtatanoj" (nova franca ĝenerala statuto de ŝtatoficistoj) por atentigi ilin, ke la ĵuro, kiu trudas la sekreton al

la ŝtatoficistoj de la "Centra Oficejo pri Protekto kontraŭ la Jonigantaj Radiadoj", eĉ post la ĉeso de iliaj funkcioj, estas kontraŭa al lia reformo. Sen respondi pri la fundo de la problemo levita de tiu kuracisto, problemo pri kiu ja kompetentas la ministro, ĉi-lastas respondas al la kuracisto, ke li transsendas lian leteron al alia ministro, - kiu 7 monatojn post la sendo de tiu letero ankoraŭ ne respondis al tiu kuracisto.

26 7. Laboristo estas infektita de plutonio kaj maldungita ĉar li rifuzas subiĝi al radiologia sistema ekzameno, kiu kreskigas la nocajn efikojn de tiu infekto. Sed tiu laboristo elmontras aliparte sen perforto religiajn opiniojn, kiuj perturbas la konformismon de la bonpensantoj. Por ne pliprofundigi la medicinan problemon starigitan de lia maldungo, la gazetaro indiferentas pri la personaj opinioj de tiu laboristo kaj rifuzas lian "respondrajton".

27 8. Universitata profesoro, krome prezidanto de grava asocio, skribas en aŭgusto de '83 al la franca Prezidento por admoni lin, ke li rezignu ekfunkciigi la supergeneratoron Super-Feniks, en Malvilo. Nenia respondo en la deka de decembro de 1983.

28 Ktp. La ekzemploj, kiujn vi povos doni, estos speciale bonvenaj. Por ilustru tiun rubrikon per freŝdataj ekzemploj, ĉu vi povus rememorigi petojn pri mediacio jam faritajn kaj lasitajn sen kontentigaj respondoj? Estus dezirinde, eĉ se vi formulas anonime viajn ekzemplojn, kiel estas la ĉi-supraj ekzemploj, ke vi povu eventuale precizigi ilin poste (kopioj de adresitaj leteroj, de ricevita respondoj, ktp).

29 La informo, eĉ en la grandaj, industriaj, modernaj socioj daŭre estas regata de la principoj, kiuj regis la komunikon de la novaĵoj en la kortego de Aŭgusto kaj de Tiberio: flataĉo, senkuraĝaj silentoj, kaj kabaloj.

30 Malmultaj homoj ekpensas miri:  
- ke la plej masiva informado estas dissendita deire de politika instanco oficiala aŭ partia,  
- deire de strukturo de ekonomiaj, privataj profitoj,  
- ke propagando kaj reklamoj superregas plejofte la elekton kaj la diskonigon de la informoj.

31 La raportoj de sondadoj, kiuj ŝajnas doni al la publika

opinio la bildon de ĝiaj propraj reagoj, estas ekzemplo pri la manipulado de la opinio sub iu ŝajno de moderna demokratio. Ĉiu sondado, mendita kaj pagita de la komanditanto, estas evidente lia posedaĵo : la kontrakto pri sondado estas sekreta, la komanditanto diktas ĝiajn demandojn kaj trudas la lokojn, kie ĝi okazu, por ke la respondoj estu favoraj; la komanditanto rezervas al si la rajton modifi la respondojn aŭ ne publikigi ilin.

32 La sondadoj ne ekzistus, se ĉiuj amaskomunikiloj kaj perantoj plenumus sian devon pri komunikado. Ĵurnalisto iam diris, ke unu letero de leganto estas kalkulita kiel la opinio de milo da legantoj. Ĉar tiu letero ne estas publikigita, oni anstatauigas ĝin per sondado kaj oni deklaras kun nekredebla aŭdaco, ke specimeno de milo da sonditaj personoj reprezentas la opinion de 50 milionoj da Francoj.

33 La popularec-noto de Prezidento interesas fakte nur la Prezidenton kaj la politikistojn avidajn preni lian lokon. La fakto scii, ĉu "x" elcentoj de Francoj estas por aŭ kontraŭ la disvolvigo de la nuklea energio, respondas la artifa demando, kiu donos neadekvatan respondon, ĉar la plimultego el la demanditaj personoj nescias la kaŭzojn kaj la rezultatojn pri tiu industrio. Male, ĉiuj estus forte interesataj, se iu kuracisto deklarus esti konstatinta la reintensiĝon de iu malsano imputebla al iu industrio aŭ instalejo nuklea, kiel la ĉeno "Jorkŝira Televido" anoncis freŝdate la pligrandigon de la nombro da leŭkemioj ĉe la infanoj loĝantaj proksime de la nuklea centralo de Vindskalo (en gazetaro, la 83.10.31).

34 La KODO DE KOMUNIKA DEONTOLOGIO, proponita al ĉies juĝo, ebligu al ŝtatanoj unue establi la konstaton pri la mankoj de la informo, poste deziri publikigi tiun konstaton, fine partopreni en la ago lanĉita de la UNIVERSALA GRUPO DE PERSONOJ KAJ ASOCIOJ AKTIVANTAJ POR STARIGI KODON DE KOMUNIKA DEONTOLOGIO.

#### IV. KONSTATOJ

35 1. La petanto : individuo aŭ reprezentanto de asocio povas esti ignorata de la perantoj aŭ amaskomunikiloj, kiel ajn konforma kaj objektiva estu ĝia peto.

36 2. Leĝoj, kiuj koncernas la komunikadon - kiam ili ekzistas - favoras la potenculojn je la malprofito de la malfortuloj. Ekzemple : potenculo povos publikigi artikolon aŭ serion de artikoloj dum malfortulo ne povos tion, pro sia malriĉeco aŭ/kaj ĉar ĝia malforto ne alarmas la amaskomunikilon. Ĵurnalo ĉiam publikigos la "respondraĵton" de potenculo kaj povos memvole ignori tiun de malfortulo.

37 3. Nenia responddewigo estas leĝe starigita en Francio por la plimulto el perantoj kaj amaskomunikiloj, krom la periodaĵoj kun tiu limiga kondiĉo, ke la petanto (persono aŭ asocio) estu persone citita (par. 13a de la franca leĝo pri la gazetaro, en la 29a de julio 1881). Tiu limigo instigas evidente la ĵurnalojn publikigi kalumniojn : ilia procesoficejo indikas al ili, kie ili povas iri sur tiu vojo.

38 4. Nenia adekvateco de la mediacio estas trudita al la perantoj aŭ amaskomunikiloj. Se via advokato defendas vin tiel malbone, ke vi estas nejuste kondamnita, neniu persekutos vian advokaton pro malbona komunikado.

39 5. La tempo efikas kontraŭ la petantoj, profite al la perantoj kaj amaskomunikiloj. Malrapide juĝopovo malkuraĝigas la malfortulojn kaj favoras la potenculojn, kiuj scias atendi juĝon, favoran aŭ ne malfavoran al ili. Kaj eĉ tiu tempo povas esti misuze taksita kiam, ekzemple, la ĉefredaktoro de ĵurnalo respondas al vi, eĉ post mallongega tempo, ke via letero "cetere tre interesa, ne plu estas aktuala", eĉ se ĝi restas evidente tia. Ministro eluzos vian paciencon, ne respondante al via letero, aŭ respondante al vi malprecize, aŭ resendante vin al alia ministrejo. Koncerne la francan Ŝtatan Konsilion, ĝi atendigos dum jaroj la juĝon de peto al malestiminda malfortulo.

40 6. La profesio, la komisiono aŭ la devo de mediacio estas iafoje fakte nur la ŝajno de tiu profesio, komisiono aŭ devo. Kiu scias, ekzemple, ke elektito ne estas devigata plenumi la promesojn, kiujn li faris kiel kandidato al siaj elektontoj, eĉ se tiuj promesoj estas tuj realigebaj ? Oni legos pri tiu temo kun granda profito : "Le peuple et son maître - Pour un coup d'état de l'individu" (La popolo kaj ĝia mastro - Por ŝtatrenverso



fare de la individuo), de J.F. Prévost (Plon, eldonisto en Parizo). Do li povas scie ne respondi al peto pri mediacio aŭ respondi al tiu prokraste aŭ neadekvate.

41 7. La rolo de la profesia peranto (leĝodona, administra, juĝa, ktp) estas fiksita surbaze de ĝia profesio; ĝia statuto - se ekzistas - devigu lin respondi al **ĉiuj** petoj prezentitaj de la petantoj, **rapide** kaj **adekvate**. En kiuj paragrafoj de la diversaj statutoj estas starigita tiu devigo? Kontraŭe, iuj perantoj laŭ komisio aŭ devo ne komprenas la devigojn, kiuj rezultas de tiu komisio aŭ devo, kies unua estas ne malestimi la petanton; ekzemple: ĵurnalisto, kiu ne respondas al petanto, malestimas lin; se li ne povas aŭ ne volas respondi, tio estas, ĉar li ne aŭ ne plu meritas esti ĵurnalisto.

42 La amaskomunikiloj, laŭ mezuro kiel la petantoj aŭ perantoj alvokas ilin, same komprenu la devigojn, kiuj rezultas de ĝia ekzisto, kies unua estas egale ne malestimi la petantojn aŭ la perantojn.

#### V. PRINCIPOJ, KIUJ KONCERNAS LA AMASKOMUNIKILOJN

43 1. La publiko, longe kondiĉita de la orientita informado de la amaskomunikiloj, ne postulas de ili tutan informadon, ĉar ĝi opinias, ke ĝi estus samfoje nebla kaj neutila por la amaskomunikiloj kaj por tiuj, kiuj utiligas aŭ suferas ilin. Fakte, ĉiu peranto, kiu uzas la amaskomunikilojn, ĉiu informanto, ĉiu grupo de informantoj, kiu konsistigas amaskomunikilon, ĉiu serio de informoj povas raporti nur tre limigitan ensemblon de faktoj, laŭ decidita perspektivo.

44 Ĉiu informo do devas esti akompanata de la preciza indiko pri ĝiaj fontoj: kiu informas? kiam okazis la evento kaj la informo, kiu raportas ĝin? kie? Kiuj personoj atestis pri ĝi? Kiuj estis la limoj de la observo: kion oni elektis observi, kion oni elektis ne observi?

45 2. Oni ne povas postuli de la informantoj subliman indiferecon pri la donitaĵoj, kiujn ili komunikas: estetikaj gustoj, moralaj aŭ/kaj politikaj elektoj, karaktero kaj eĉ humoro apartenas al la kapabloj de ĉiu informanto. **Sed li povas nek ignori tiujn aferojn nek lasi ignori ilin.**

46 Tiel ĉiu informanto devus mencii, komence de sia

48

raporto: sian identecon, siajn politikajn apartenon aŭ preferojn, sian sindikatan formiĝon, siajn diversajn titolojn kaj, kial ne, sian humoron, ne depende de la okazaĵoj, kiujn li raportas, kiel malpasiema kaj neutila deco rekomendas ofte al li fari tion (kiom oni suferas pro tiu deca patoso kaj funebra ĝentileco, kiuj akompanas la sangajn abomenaĵojn, kiujn oni prezentas al ni!).

47 Estus rekomendite al li precizigi la staton de hasto aŭ de sekureco, de maltrankvilo aŭ de persona certiĝo, en kiu li realigas, tie kaj tiam, la operaciojn de sia profesio. Okaze, se estus rekonite, ke liaj deklaroj estas falsaj, li estus punebla ĉe la juĝopovo.

48 3. Ĉiu rimedo de informo skribita, parolita, perbilda, devas esti prezentita rezervante lokon aŭ tempon por la libera interveno de **ajna persono** ricevinta la informon.

49 4. Se la publiko ne postulas de la amaskomunikiloj tutan informon, li devus almenaŭ postuli **esencajn informon**, tio estas tiu, kiu donas, resumas, rememorigas la esencajn novaĵojn en la mondo kaj en la regno, kaj tiuj esencaj novaĵoj laŭ la estonteco povas ne prezenti spektaklan aŭ skandalan karakteron.

50 Freŝdata novaĵo ilustras la gravecon de la esenca karaktero de iuj informoj: profesoro Sune BERGSTRÖM, Nobel-premio de medicino en 1982, prezidis "Internacian komitaton de ekspertoj en medicinaj sciencoj kaj publika sano". Inter aliaj ciferoj, tiu komitato deklaris, ke la nukleaj bomboj povas atingi iun ajn punkton sur la terĝlobo kaj, ke "tuta milito", kiu uzus nur la duonon de la nukleaj armiloj farus pli ol 1 miliardon da mortintoj kaj pli ol 1 miliardon da vunditoj. Kio subkomprenas, ke se oni uzas la tuton de la nukleaj armiloj, oni mortigos aŭ vundos la 9/10-onojn de la homaro. **Jen esenca novaĵo**: kiom da ĵurnaloj skribitaj, parolitaj, televiditaj raportis ĝin? Kiom da utiligis tiun esencan novaĵon por diskonigi enketojn, demandi klerulojn, ŝtatestrojn? Kion ni povas opinii pri la rolo de komunikado plenumita tiuteme de la amaskomunikiloj?

51 Laŭ difino, regno submetita al diktatoreco suferas la cenzuron de la informoj, kaj la regatoj de tiu regno - se ili petas komunikadon - faras tion riske de sia persona

libereco. Kontraŭe, en liberala regno, ŝtatano povas peti komunikadon kaj ricevi de la amaskomunikiloj almenaŭ la esencajn informojn, **kondiĉe, ke ili malsekretigu ilin.**

52 Oni povas rekoni, ĉu liberala regno estas demokratia, kiam ĉiuj esencaj informoj estas donataj kaj kiam ĝia esenca karaktero estas eksplikata, rememorigata tiel longtempe kiel necese. Se esenca informo kun internacia karaktero estas donita en iu lando, cenzurita en alia, la unua regno estas demokratia, ne la dua; la unua permesos la komunikadojn, ne la dua.

53 Nu, ĉiuj registaroj, dank'al siaj multnombraj informoficejoj, scias ekstrakti horon post horo la esencajn informojn inter ĉiuj, kiujn kolektas tiuj oficejoj. Kaj ĉar ili disponas pri trudrimedoj al la mastroj de la amaskomunikiloj, oni povas diri, ke regno estas demokratia, se ĝiaj amaskomunikiloj diskonigas ĉiujn esencajn informojn tiel longe kiel ĉi-lastaj konservas tiun esencan karakteron.

54 5. Kontrolo de la mediaciaj reguloj devus esti starigita. Ĝi povus dependi de Supera Aŭtoritato de la Mediacio, sendependa de la povoj, konsistanta el konstantaj aŭ okazaj specialistoj sendependaj de la povoj, kaj de juĝantaro lotita kaj renovigebla ĉiusemajne. Oni statistike antaŭzorgu, ke konsisto de tiu juĝantaro estu plejeble heterogena koncerne la homajn, sociajn, intelektajn kaj kulturajn kvalitojn de la individuoj konsistigantaj tiun Superan Aŭtoritaton de la Mediacio.

## B. PROJEKTO PRI KODO DE KOMUNIKA DEONTOLOGIO

55 **Paragrafo 1a.** En la dato de ..... estas starigita KODO DE KOMUNIKA DEONTOLOGIO, kiu fiksas la rajtojn de la petantoj kaj la devojn de la perantoj kaj amaskomunikiloj.

56 **Par. 2a.** En la nuna kodo, oni nomas :

57 2.1. **Petanto**, ĉiun fizikan aŭ moralan personon, kiu petas skribe aŭ parole la helpon de peranto aŭ/kaj de amaskomunikilo;

58 2.2. **Peranto**, ĉiun fizikan aŭ moralan personon, kies

50

profesio, komision aŭ devo celas intervenon demande de petantoj kaj favore al ili;

59 **Ĵurnalisto**, peranton, kiu skribas en periodaĵo, parolas en radiostacio aŭ per bildoj, produktas fotografaĵojn, mapojn, desegnojn, grafikaĵojn, skemojn, uzatajn de la gazetaro skribita, parolita aŭ televidita, ĉu li estas profesia ĵurnalisto, specialisto salajrata aŭ ne, daŭra aŭ okaza aŭ simpla okaza korespondanto;

60 2.3. **Amaskomunikilo**, publikan kaj kolektivon rimedon de komunikado inter fizikaj aŭ moralaj personoj, petantoj aŭ perantoj;

61 2.4. **Mediacio**, la rezulton de la peto farita de petanto ĉe peranto (kiu utiligas eventuale la helpon de amaskomunikilo) aŭ de amaskomunikilo (kiu utiligas eventuale la helpon de peranto).

62 **Par. 3a.** Ĉiu petanto povas pretendi pro paragrafo de tiu kodo tuj post ĝia aperado. La ne-aperado de dekretoj kaj aŭ de aplikcirkuleroj ne povas esti kontraŭstarigita al li. Sankcio : ....

63 **Par. 4a.** Nenia limtempo de forkludo povas esti kontraŭstarigita al petanto, kiu pretendas pro unu el la paragrafoj de tiu kodo. Sankcio : .....

64 **Par. 5a.** La esenca devo de perantoj kaj amaskomunikiloj estas kompreni kaj plene praktiki sian profesion, komision aŭ devon enketi pri la petoj, kiuj estas prezentitaj al ili skribe aŭ parole.

65 **Par. 6a.** Ĉiu petanto povas procesi kontraŭ peranto aŭ amaskomunikilo kiu, laŭ li, evidente malbone defendis lin.

66 **Par. 7a.** Ĉiu fizika persono povas procesi kontraŭ peranto aŭ amaskomunikilo, kiu atencis lian honoron, eĉ anonime.

67 Ĉiu morala persono povas procesi kontraŭ peranto aŭ amaskomunikilo, kiu atencis ĝian honoron aŭ tiun de samgrupano, eĉ anonime.

68 La koncerna peranto ne povos pretendi pro kia ajn funkcio, privilegio de kia ajn juĝpovo por forigi tiun plendon aŭ prokrasti ĝian proceduron. La koncerna amas-

komunikilo ne povos pretendi pro submetiĝo al povo por forigi tiun plendon aŭ prokrasti ĝian proceduron. Sankcioj : .....

- 69 **Par. 8a.** La funkcio de peranto trudas al li respondi senprokraste kaj adekvate al petanto aŭ indiki al li kial li ne povas kontentigi lian peton kaj al kiu(j) fizika(j) aŭ morala(j) persono(j) li sin turnu. Neniel peto restu sen valida respondo. Sankcio : .....
- 70 **Par. 9a.** La amaskomunikiloj devas respondi senprokraste kaj adekvate, uzante siajn komunikajn rimedojn, al ĉiuj petoj prezentitaj de petantoj aŭ perantoj, aŭ indiki al ili kial ili ne povas kontentigi iliajn petojn kaj al kiu(j) alia(j) amaskomunikilo(j) aŭ peranto(j) ili sin turnu. Neniuokaze ili povas lasi peton sen valida respondo Sankcio : .....
- 71 **Par. 10a.** La tribunaloj alvokitaj de petantoj aŭ de perantoj malkontentaj pri mediacioj eldiritaj aŭ tro longe atenditaj devas tuj juĝi tiujn postulojn. Se limtempo estas necesa por ekzameni postulon kaj verdikti, provizora juĝo estos eldirita, tiam favore al petanto.
- 72 **Par. 11a.** Ĉiuj publikaj aŭ duonpublikaj organismoj devas tuj atesti ricevon de ĉiuj leteroj, telegramoj, telefonvokoj, ktp, kiujn ili ricevas de petantoj. Tiu ricevavizo devas permesi al ĉiu petanto sekvi la iradon de sia peto. Se la ricevavizo malfruas, la tribunalo alvokita de la petanto devos trudi al la persekutita instanco imperativan limtempon por adekvata respondo. Sankcio : .....
- 73 **Par. 12a.** Ĉiuj artikoloj, fotografaĵoj, mapoj, desegnoj, grafikaĵoj, skemoj, kiuj aperas aŭ estas raportitaj sur la komunikilo skribita, parolata, televidita, devas esti subskribitaj tiamaniere, ke la subskribinto, eĉ se li subskribas per pruntnomo, povu esti eventuale identigita de la justico. Sankcio : .....
- 74 Se ili originas de agentejo por artikoloj pri ĝeneralaj aŭ specialigitaj informoj, por raportaĵoj, desegnoj, fotografaĵoj, filmoj, ktp, ili devas indiki la nomon de la koncerna agentejo kaj tiun de la persono aŭ de la organizo, kiu provizis ilin al la agentejo, por ke tiu ĉi diskonigu ilin. Sankcio : .....
- 75 **Par. 13a.** Ĉiun informon akompanu la preciza indiko

pri ĝiaj fontoj : Kiu informas ? Kiam okazis la evento ? Kie ? Kiuj personoj atestis pri tiu ? Kiuj estis la limoj de la observo : kion oni elektis observi kaj kion elektis ne observi ? Sankcio : .....

- 76 **Par. 14a.** Por ĉiu informo, kiu koncernas la personojn, la ĵurnalistoj devas konigi siajn politikajn, moralajn, sindikatajn, ktp, personajn emojn kaj elektojn, eĉ se ili certigas praktiki objektivajn sian profesion. Sankcio : .....
- 77 **Par. 15a.** Ĵurnalista, kiu demandas personon, devas registri sian enketon per du magnetofonoj aŭ/kaj kameraoj, kaj doni al la demandita persono unu el la kasedoj aŭ/kaj filmoj, kiuj konstatas tiun enketon. Tiuj kasedoj kaj filmoj estos datitaj kaj subskribitaj de la ĵurnalista kaj de la demandita persono. Sankcio : .....
- 78 **Par. 16a.** Radio- kaj televido-stacioj devas publikigi oficialan ĵurnalon (eventuale komunan), kiu enhavas la tutan reprodukon de paroloj, tekstoj presitaj sur la ekranoj, fotografaĵoj, mapoj, grafikaĵoj, kun la datoj kaj horoj (eventuale la minutoj) de ties aperigoj. Sankcio : .....
- 79 **Par. 17a.** La ĵurnalistoj de televido devas indiki la komencan fonton de ĉiu el la informoj, kiujn ili raportas : personon aŭ/kaj organizon aŭ/kaj agentejon. Ili rifuzu raportojn informon de agentejo, se tiu ĉi ne indikas sian komencan informanton. Sankcio : .....
- 80 **Par. 18a.** Televido-stacioj devas konservi ĉiujn bildojn kiujn ili produktas, transdoni unu kopion al Nacia Biblioteko, al Arkivoj de sia departemento (aŭ teritoria unuo), al Arkivoj de la justicministro kaj, laŭ justica postulo, vidigi al la koncernaj telespektantoj la fragmentojn, kiujn ĉi-lastaj kontestas. Sankcio : .....
- 81 **Par. 19a.** Ĉiuj filmoj, kion ajn ili celas (paganta publiko, lernejoj, propagandfilmoj industriaj aŭ aliaj, ktp) devas kunporti la nomo(j)n de la komandanto(j) kaj produktisto(j). Kompleta kopio devas esti transdonita al la Nacia Biblioteko, kiu plenumos ĝian kompletan konservadon. Sankcio : .....
- 82 **Par. 20a.** Ĉiuj reklamdokumentoj skribitaj, parolitaj, viditaj, devas esti tuj deponitaj ĉe la oficialaj instancoj

de konservado de tiuj dokumentoj, por ke ĉiuj petantoj povu eventuale denunci iliajn mensogojn (\*).

83 **Par. 21a.** Ĉiu rimedo pri informo skribita, parolita, per bildoj, devas kunporti lokon aŭ tempon por la libera interveno de iu ajn persono, kiu ricevis la informon. Tiu loko aŭ tempo povas ne sekvi tuj la koncernan informon. Tiu respondeblo devas esti rememorigita en la periodaĵoj kaj komence de ĉiu elsendo pri parolataj aŭ televidataj informoj. Sankcio : .....

84 **Par. 22a.** Ĉiu sondado de la publika opinio devas indiki :

- la fizikan aŭ moralan personon, kiu mendis la sondadon,
- la celon de tiu sondado,
- la elektitajn demandojn, kaj de kiu (la komanditanto aŭ/kaj la instituto pri sondadoj),
- la socian medion, kie okazis la sondado,
- la nombron da demanditaj personoj kaj la procenton, kiun tiu nombro reprezentas rilate al la tuta nombro de personoj, kiuj partoprenas en la konsiderita medio,
- en kiu meza tempo ĉiu demandita persono respondis al la tuto de la faritaj demandoj,
- ke la kompleta protokolo pri la sondado estis deponita antaŭ la sondado en la Nacia Biblioteko, en Arkivoj de la justicministrejo kaj en la Supera Aŭtoritato de la Mediacio proponita en la sekvanta paragrafo.

85 **Par. 23a.** Supera Aŭtoritato de la Mediacio zorgas, ke la komunikado inter petantoj, perantoj kaj amaskomunikiloj estu facila, komprenebla, rapida kaj, ke la petita mediacio estu adekvata. Ĝia kompetenteco, morala, ne anstataŭas tiun de la tribunaloj, sed ĝi permesas limigi la liberan apelacion al ili.

### C. ASOCIO

86 Por realigi la celojn ĉi-supre prezentitajn, ŝajnas utile krei universalan asocion, por ke la anoj de ĝiaj naciaj, lokaj, categoriaj sekcioj povu pretendi pro la komunikaj garantioj, kiuj ekzistas en aliaj regnoj.

Alvoko diskonigita en la 83.09.19

La.....

Ĝisdatigo n° 4 : 84.01.25

Por la GRUPO aŭ unu el ĝiaj sekcioj :

(1) Tiun proponon faris D-ro O. Roujansky en sia bulteno : "Contre-Publicité, contre-pub" (Kontraŭ-Reklamo, kontraŭ-Rek'o) de la 83.11.20.

## laŭtaj informoj kaj petoj



*Ni ricevis ĉi-subajn informojn pri la persekutado kaj enprizonigo de hungaroj en Transilvanio (Rumanio) kaj en Ĉeĥoslovakio :*

\* Géza Pálfi, 43-jara hungara katolika pastro en Székelykeresztur (Transilvanio) estis malliberigita, turmentita kaj batita fare de rumanaĵ sekurecaj policistoj en Marosvásárhely (Transilvanio). En la sekvinta mateno li estis transportita en hospitalon, kie li mortis post dumonata kuracado. Oficiala kaŭzo de la morto : kancero de hepato. La kialo de lia malliberigo en Kristnasko 1983 estis lia prediko, en kiu li aludis pri la suferadoj de hungaraj etnaj minoritatoj en Transilvanio. Li estis entombigita kun la akompanado de 206 katolikaj pastroj kaj granda homamaso.

\* Béla Pál, 55-jara hungara instruisto en Ditra (Transilvanio) estis malliberigita fare de la rumana polico en la 25a de majo, 1983. Oni minacis lian edzinon, ke ŝi ne diru la malliberigadon de la edzo al iu, ĉar li venos hejmen post kelkaj tagoj. Tamen S-ro Pál estis akuzita post du monatoj, ke "li volis renversigi la socialisman sistemon". Li estis kondamnita je ses jaroj da mallibereco sen ajna detala klarigo pri la akuzo. En la malliberejo li povas ricevi vizitanton nur dufoje jare. La sendado de la necesaj kuraciloj estis malpermesita. Laŭ kuracistoj lia plua restado en la malliberejo povas kaŭzi lian morton. Lia edzino resumas, ke la akuzo kontraŭ sia edzo povas esti : 1. S-ro Pál skribis leteron al la rumana televido kaj radio, petante la plimultigon de programoj kaj peradoj en hungara lingvo. 2. En la jaro 1983 li pasigis du monatojn en Budapeŝto kaj partoprenis en la enterigo de Gyula Illyés, konata hungara poeto kaj verkisto.

\* Miklós Duray, 39-jara advokato de hungaraj etnaj minoritatoj en Ĉeĥoslovakio estis malliberigita en la 10-a de majo pro politikaj kialoj. Laŭ raportoj, kun Duray ankaŭ aliaj ok hungaraj intelektuloj estis ripetite alvokitaj por priaŭskultado en la policejo dum la lastaj dek tagoj. Duray estis akuzita en Pozsony (Ĉeĥoslovakio) pri "aktivado kontraŭ la interesoj de la ŝtato" kaj pri "disvastigado de ribeliga materialo". Se li troviĝas esti pekulo, li estos kondamnita je mallibereco dum tri jaroj kaj ses monatoj. Dum la lastaj tri monatoj S-ro Duray gvidis senekzemplan kaj sukcesan protestan movadon per petleteroj subskribitaj de kelkaj dekmiloj da loĝantoj kontraŭ tiu leĝo, kiu povus rezultigi la ĉesigadon de la etnaj minoritataj lingvaj lernejoj kaj klasoj, vizitataj de unu miliono

da hungaraj loĝantoj. En la j. 1978, Miklós Duray, geologo, verkinto de kelkaj studoj, kontrabandis ilin el Ĉeĥoslovakio kaj eldonigis ilin en Parizo kaj Novjorko, montrante kiel la oficialaj decidoj senigas hungarojn nun vivantajn en Ĉeĥoslovakio je iliaj homaj rajtoj. Li estis malliberigita pro siaj skribaĵoj la 10an de novembro 1982 kaj oni ellasis lin la 24an de februaro 1983 kiel rezulton de vigla internacia agado en Eŭropo kaj Usono. Inter tiuj, kiuj per ĵurnalaj artikoloj postulis, ke la ĉeĥoslovakia estraro plenumu la interkonsentojn de la Helsinka Fina Kontrakto koncerne S-ron Duray kaj la hungarajn etnajn minoritatojn, estis pluraj usonaj registaraj kaj kongresaj personoj kaj verkistoj Irving Howe, Susan Sontag kaj Kurt Vonnegut.

**Bonvolu skribi aŭ sendi telegramon al unu aŭ pluraj el ĉi-subaj personoj, petante la ellasodon de Béla Pál kaj la esploron pri la morto de Pastro Géza Pálfi :**

- Nicolae Ceausescu, Calea Victoriei 49/53, Bukarest, RS Romania, prezidento. Telegramoj : Prezidento Ceausescu, Bukarest, Romania Telex: 10553 mcext.
- Gheorghe Chivulescu, ministro de justico, Bulevard Gheorghe Gheorghiu-Dej 33, Bukarest, RS Romania. Telegramoj : Gheorghe Chivulescu, Ministro de Justico, Bukarest, Romania Telex: 10553 mcext r attention Gheorghe Chivulescu.
- George Homostean, ministro de internaj aferoj, Str. Eforiei 3, Bukarest, RS Romania. Telegramoj : George Homostean, Ministro de internaj aferoj, Bukarest, Romania, Telex: 10553 mcext attention George Homostean.
- Barbu Popescu, ambasadoro de Rumanio, 655 Rideau Street, Ottawa, Ontario K1N 6A3.
- Mircea Malitza, ambasadoro de Rumanio, 1607 23-a Street, N.W. Washington D.C. 20008.

**Bonvolu skribi aŭ sendi telegramon al unu aŭ pluraj personoj, petante la ellasodon de Milos Duray :**

- Gustav Husak, prezidento, Ludvika Svobody 12, Prague, Hrad, Ĉeĥoslovakio.
- Dr. Jaromir Obzina, ministro pri internaj aferoj, Ministrejo de Internaj Aferoj, Prague, Ĉeĥoslovakio.
- Jaroslav Vantovsky, Ambasadoro de Ĉeĥoslovakio, 3900 Linnean Avenue, N.W. Washington, D.C. 20008.
- H.E. Stefan Murin, Ambasadoro de Ĉeĥoslovakio, 50 Rideau Terrace, Ottawa/ Quebec, Canada K1M 2A1.

**Aŭ bonvolu skribi al la ambasadoro de Rumanio kaj Ĉeĥoslovakio en Parizo, kies adresojn bedaŭrinde ni ne konas.**

(el letero ricevita ĉe red. de "Laŭte!")

\*\*\*\*\*

**La venonta 'Laŭte!' aperos fine de marto  
(ricevos ĝin nur la (re)abonintoj)**

\*\*\*\*\*

*Via abono finiĝis!*

## Projekto de medicina helpo por Palestinanoj de Libano

Nun pli ol 400 000 Palestinanoj estas rifuĝintoj en Libano. De multaj jaroj la plimulto loĝas en barakaroj en la ĉirkaŭaĵoj de Bejruto, Tripoli, Saida kaj Tir. La loĝantaro devis alfronti la murdajn konfliktojn, kiuj sango-kovris la landon. De 1982, la malestigo de la sociaj kaj sanitariaj organizoj pliaĉigis la vivkondiĉojn. La malsanulejoj kaj dispensarioj de la Palestina Ruĝa Krescento estis fermitaj (Sud-Libano) aŭ malhelpitaj funkcii pro personaro minacita je aresto, pro rabado de materialoj, pro administraciaj ĉikanaĵoj (Bejruto).

Antaŭ tiu situacio, la Franca Palestina medicina asocio decidis daŭrigi sian agadon rekte al la Palestinanoj en Libano. Projekto : Sendi por trimonata periodo taĉmentojn konsistantajn el unu kuracisto, unu aŭ du flegistinoj, kompletan taĉmenton por socia medicina centro por rifuĝintoj en Bejruto. Tiuj taĉmentoj estas transprenitaj de la asocio. Mankas volontul(in)oj.

### Pri patronado de palestinaj infanoj

Konkrete, vi povas helpi palestinan infanon. Eblas al vi patroni infanon, kies patro mortis aŭ dum militagado aŭ en rezistado, aŭ estas en malliberejo. Celo de tiu patronado : alporti materialan helpon ebligantan al la familio vivteni la infanon kaj certigi lian lernantecon.

Kiu organizas la patronadojn ? Ilin organizas la virina asocio de El Bireh. La peto okazas de la Franca Palestina Medicina Asocio. Pri la virina asocio de El Bireh : El Bireh situas 20 kmjn norde de Jerusalemo. En 1948, pro la milito, miloj da rifuĝantoj instaligis en tendaroj kaj vivis en mizeraj kondiĉoj. En 1965 la virinoj de El Bireh kreis la asocion Inash El Usra ("por ke vivu la familio"). Ili celis alporti rimedojn al la vidvinoj, plialtigi la socian, kulturen, profesion nivelon.

Post la milito en 1967 kaj la izraela okupado, pluraj respondeculoj de la asocioj estis arestitaj kaj forpelitaj. Pro tuta detruado de vilaĝoj, novaj rifuĝantoj alvenis senpage subtenataj de la asocio.

Nun la asocia agado plurkampe etendiĝas :

- infanĝardeno kaj infanvartejo
  - alfabetiga centro por plenkreskuloj
  - esplora centro pri palestina folkloro. Ekzistas biblioteko kun pli ol 4000 libroj.
  - metilernada centro : sekretaria kaj komerca fakoj, maŝinbrodado, kudrado
  - universitataj stipendioj por 200 studentoj.
  - medicina asekuro : 85 kuracistoj fleugas senpage. Inter ili 10 estis senditaj de F.P.M.A.
  - akcepta loĝiga centro por la infanoj de la militviktimoj.
  - patronado de infanoj kaj helpo por la malbonstataj familioj.
- Por ĉiuj informoj sin turni al : A.M.F.P., 14 rue de Nanteuil, 75015 Paris.

**Ginette G.**

## LA POREGALECA KUNVENO EN BORDOZO

La Kontraŭrasisma vojo trapasis Bordozone la 10an, 11an kaj 12an de novembro.

Okaze de sia lasta grupkunveno, la Ĝirondia E-Grupo aliĝis al la kolektivo organizita de A.S.T.I. (laborista asocio por enmigrintoj). Malgraŭ tio, nur sep geesperantistoj fizike partoprenis en diversaj agadoj.

Por anonci la alvenon de la "Konverĝanaro" konsistanta el 6 portugaloj, 5 magrebanoj, 6000 afiŝoj estis gluitaj en Bordozone kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Samtempe sur la muroj aperis rasistaj sloganoj. En la ĵurnalo "Sud-Ouest" oni povis legi artikolon nur la antaŭtagon de la alveno.

Niaj neperfortaj, kuraĝaj gejunuloj (kelkaj libertempis sen salajro dum unu monato) atingis Bordozone, sabaton fine de la posttagmezo, lacaj pro veteraĉo kaj paneoj de motorbicikloj. Vespere, en Pessac, Mérignac, Cenon, ili animis debaton pri la vojirado kaj la celo de la agado. Ili motorbiciklis el Tuluzo, haltis en Montauban, en Vernet (Arieĝo). Tie ili vizitis la lokon de la antifrankista koncentrejo, kie mortis hispanaj revoluciuloj, en Tarbo, Paŭo, Mont-de-Marsan. En Langono, ili ricevis kortuŝan akcepton, eĉ la policistoj bonvenigis ilin.

Dimanĉon matene okazis du subtenantaj marŝadoj. Posttagmeze, komenciĝis spektaklo, debato, ĝisnokte daŭrintaj. Estis projekciita la sentoplana filmo "Bako kaj la alia riverbordo". Estis bone ludita: "La domo de Joha", infanteatraĵo organizita de la porinfanenmigrinta instruisto, en la kadro de P.A.E (eduka agadprojekto).

Dum 24 horoj (de dimanĉo vespere je la 22a ĝis lundo vespere) la konverĝanoj subtenataj de kuraĝuloj, idealistoj, senĉese ĉirkaŭiris la Tribunalon. Samtempe, tiu agado disvolviĝis en Liono, Epinalo, Amieno kaj Loriento, por denunci la arbitran formon de justico, ĉefe la neegalajn faritajn nome de la etna kaj socia aparteneco, hodiaŭ pligravigita de la ekonomia krizo.

Tamen ni ne forgesu la mesaĝon de tiuj valoraj gejunuloj: Francio estas kiel motorbiciklo; por antaŭeniri ni bezonas miksaĵon kaj la rasa malsameco estas vera riĉaĵo. Ĝis la unua de decembro, laŭlonge de la irado paciencege ili klarigis la perfortan evoluadon de la rasa malamego.

Ginette G.

**Aldono de J.G.:** Jam en 1983 kelkaj filoj kaj filinoj de enmigrintaj laboristoj en Francio "Beurs" (Araboj en slango de la ĉirkaŭurboj) marŝis el Marsejlo ĝis Parizo por protesti kontraŭ la rasistaj sintenoj kaj informi la loĝantojn de la trairataj urboj. En Parizo okazis centra manifestacio, en kiu oni povis legi sur flagrubando: "Kiel por motorbicikloj, por antaŭeniri necesas miksaĵo!". Tiu slogano estis la temo de la "Konverĝado 1984"...Meze de novembro gejunuloj de la "dua generacio" (naskitaj en Francio) de enmigrintoj foriris el kvin anguloj de la lando: Lilo, Bresto, Tuluzo, Marsejlo, Strasburgo al Parizo per motorciklo, haltante en diversaj urboj dum la vojaĝo. En tiuj urboj estis aranĝitaj manifestacioj kaj festoj kun la partopreno de kontraŭrasistaj movadoj.

La 1an kaj 2an de decembro la motorciklantoj alvenis en Parizo, kie okazis relative grava manifestacio kuniganta proks. 80 000 personojn : francojn kaj enmigrintojn el diversaj landoj, kaj ankaŭ festo kun la partopreno de kantistoj, muzikistoj, ktp, el diversaj etnaj grupoj. Interesa estas la fakto, ke tiun "konverĝon 1984" tute mastrumis la gejunuloj mem sendepende de la politikaj partioj aŭ sindikatoj, sed ankaŭ de la francaj kontraŭrasismaj movadoj kun nura slogano : "Por egaleco de la rajtoj inter Francoj kaj enmigrintoj".

J.G.

**AL LA GEAMIKOJ DE D-rino Lina GABRIELLI :** K a r a j geamikoj ! Kiel vi jam scias, mi edziniĝis en Parizo la 22.6.84. Mia edzo, Sinjoro Maksimilien Trenner, min rekomendis reorganizi mian libroservon. Kelkaj eldonaĵoj estas jam elĉerpitaj ; sed estas aliaj, kiuj ankaŭ atendas legantojn. Pro tio mi vin petas MENDI almenaŭ unu el ili. Petu katalagon! Se vi mendas dum la daŭro de unu monato post la ricevo de tiu ĉi reklamo, vi ne pagos la sendkostojn.

Kun mia korega saluto, via

D-rino Lina TRENNER GABRIELLI  
166, avenue Daumesnil, F 75012 PARIS

### **DORDONJO : Périgueux.**

La Perigorda E-Grupo provas konatigi E-on en la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj : partopreno al du elsendoj ĉe lokaj radioj, artikoloj en lokaj gazetoj, prezentado de E en lernejoj. De unu monato estis starigita publika kurso : ĝis nun 7 lernantoj ĉeestas. **Grava problemo** estas trovi rimedon por plenigi la kason de la grupo, ĉar ne ekzistas mecenato !

J.G.

### **Aktivaĵoj de la Asocio de Laboristaj Esperantistoj FLE en Nederlando en 1985**

Kiel kutime FLE ankaŭ en 1985 organizas diversajn kurssemajnfinojn en naturamikaj domoj en Nederlando. La kursanoj, komencantoj kaj progresantoj, estas instruataj en malgrandaj grupoj dum ses horoj en la semajnfino. Datoj :

26an/27an de januaro en "Het Zeehuis" en Bergen, Nord-Holando

30an/31an de marto en "De Hondsrug" en Noorderlaren, Groningeno

22an/23an de junio en "Morgenrood" en Oisterwijk (ostervejik), Nord-Brabanto

19an/20an de oktobro en "Koos Vorrinkhuis" en Lage Vuursche, Utreĥto

Krome okazos kurskampado dum ĉielirtago kaj la postaj tagoj, de la 16a ĝis la 20a de majo en la kampadejo en Eerbeek, kiu situas en la mez-orienta parto de Nederlando, en la apudeco de Apeldoorn. Oni matene instruos E-on en diversnivelaĵoj kaj cetere ekskursos en la ĉirkaŭaĵo, promenos, sportos, aktoros, kantos. La manĝaĵojn oni mem preparu. Eventuale oni povos aranĝi kundormadon ĉe aliaj partoprenantoj en la tendo.

De la 13a ĝis la 20a de julio okazos internacia junulara renkontiĝo, organizita de FLE kaj SAT-Junulfako, en la junulara centro de la naturamikoj, kiu nomiĝas "Ons Honk" (Nia Ejo) en Lage Vuursche (lage vuurse), en la centro de Nederlando. Oni povas ankaŭ tie kampadi. Pliajn informojn vi trovos en venonta "Laŭte!".

Kulturaj semajnfinoj : Je la 8a, 9a kaj 10a de marto okazos kultura semajnfino en la naturamika domo "Kriikkenhaar" apud Almelo, orienta Nederlando. Temo estos "Diskriminacio". Prelegoj kaj diskutoj, distraĵoj, dancoj, ktp. Inf. ĉe FLE, Hankemaborg 36, NL 7608 DH Almelo.

Je la 19a kaj 20a de oktobro en "Koos Vorrinkhuis", Lage Vuursche, okazos la tradicia Faulhaber-semajnfino. Ĉeĥa preleganto estas invitita.

Informoj pri la studsemajnfinoj : FLE, Postbus 425, 2100 AK Heemstede (tel. 023-242643 post la 19a horo).

Informoj pri la kurskampado en Eerbeek en majo : FLE, Vlasdonk 1, 1112 JD Diemen, tel. 020-909094.

\*\*\*\*\*





# **alternatives**

## **non violentes**

***dossiers, recherches, documents  
sur la non-violence***

# Numéros disponibles

## N° 36 / CHRISTIANISME ET VIOLENCES DOSSIER RENE GIRARD (15 F)

La doctrine de la guerre juste - Positions chrétiennes face à la violence. Table Ronde avec René GIRARD : le Christianisme est-il seulement refus de la violence ou bien invite-t-il positivement à la non-violence ?

## N° 38 / VIOLENCES BANALES (15 F)

La guerre commence-t-elle à la fessée ? Violences de la rue, de l'usine, de l'habitat... Comment ritualiser notre agressivité ? Un dialogue entre Michel BOSQUET et Serge JULY.

## N° 39 / LA DEFENSE CIVILE EN QUESTION (15 F)

Défense civile : protéger les populations en cas de guerre ?

Ou bien rendre aux civils le soin de leur défense ?

Un dossier essentiel sur la grève de la faim en BOLIVIE.

## N° 40 / FEMMES ET VIOLENCES (15 F)

Les violences que les femmes subissent ou celles qu'elles exercent : les femmes et la guerre, les femmes et le pouvoir, une approche historique de l'oppression des femmes.

## N° 41 / TRAVAILLEURS FACE A L'ARMEMENT (15 F)

Désarmer, est-ce se condamner au chômage ? Des économistes disent non. Exemples de plans de reconversion. Table Ronde entre Syndicats et mouvements de paix (MAN, MDPL, Mouvement de la Paix).

## N° 42 / GREVES DE LA FAIM (15 F)

Avril 1981 : trois hommes, à LYON, obtiennent par une grève de la faim l'arrêt des expulsions de jeunes immigrés. Au même moment des Irlandais commencent une grève de la faim qui échouera tragiquement : pourquoi le succès dans un cas, l'échec dans l'autre ? Des analyses, des témoignages. Un dossier irremplaçable sur un sujet où la passion l'emporte trop souvent sur l'analyse.

## N° 43 / LE NOUVEAU MOUVEMENT DE PAIX (15 F)

Hollande, Angleterre, Norvège, Belgique : pourquoi ces foules dans les rues ? Est-ce l'émergence d'un nouveau mouvement historique ? Le dossier des « euromissiles » : que va faire la France ? Petit dictionnaire pour comprendre tous ces débats.

## N° 44 / LES VOIES DU DESARMEMENT (15 F)

L'ONU invite le monde à désarmer pour survivre. Mais que peut-on espérer des différentes voies proposées : les négociations, les marchandages Est-Ouest, les initiatives régionales, les mouvements de paix ? Pour les juger, il faut connaître ces voies : ce numéro vous les présente en détail.

## N° 45 / TERRORISMES (18 F)

Il faut « démystifier le terrorisme ». Non pour l'excuser, mais pour pouvoir l'analyser dans toutes ses ramifications et montrer ses impasses. A partir des exemples Italien, allemand, Irlandais et Basque, ce dossier illustre la diversité du fait terroriste.

## N° 46 / LA GAUCHE NUCLEAIRE (18 F)

Comment, et pourquoi, le PC et le PS se sont ralliés, en 1977, à l'arme atomique. Témoignages de Patrick Viveret, Yvonne Quilès, Pierre-Luc Séguillon. Dossier complété par un historique de l'opposition à la force de frappe (1945-1965) et par des documents de l'époque.

## N° 47 / DOSSIER PALESTINE - DEFENSE PAR RESISTANCE CIVILE - DESOBEISSANCE CIVILE - J. DE BOLLARDIERE (18 F)

Plusieurs dossiers distincts dans ce numéro : Palestine et Israël peuvent-ils vivre en paix ? Un document très important présentant des propositions pour une défense de la Grande-Bretagne par résistance civile. Une étude historique de la naissance et du développement de la notion de « désobéissance civile ». L'itinéraire de Jacques de Bollardière, de l'armée à la non-violence.

## N° 48 / GUERRES SAINTES, GUERRES JUSTES (18 F)

Le sacré et le guerrier : pourquoi ce lien permanent ? — Table ronde sur la guerre sainte aujourd'hui, de l'Iran à l'idolâtrie nucléaire — Histoire des attitudes des Chrétiens face à la guerre — Vraies et fausses guerres saintes en Islam — Quelles images de Dieu favorisent la sacralisation de la guerre ? — Divers documents récents des Eglises chrétiennes complètent ce dossier.

## N° 49 / 1973-1983 : DIX ANS D'ALTERNATIVES NON-VIOLENTES (18 F)

Bilan — Témoignages — Interviews — Entretiens avec Jean-Pierre COT et Jacques GAILLOT, évêque d'Evreux. Analyse détaillée d'un sondage d'opinion sur la non-violence.

## N° 50 / DEFENSE NUCLEAIRE NON-SENS MILITAIRE (18 F)

Un officier anglais, Stephen KING-HALL fait le procès de toute défense reposant sur les armes nucléaires. Il préconise l'adoption d'une défense non armée.

## N° 51 / L'AGRESSIVITE EN QUESTION (20 F)

Du génétique au social, quatre thèses sur l'agressivité : Karli, Laborit, Wilson et Bunge.

Sortir du pénal : la pensée de Louk Hulsman.

Les évêques et la bombe.

## N° 52 / L'ESPRIT DE DEFENSE (20 F)

Comment le définir ? Le mesurer ? Pour quoi sommes-nous prêts à prendre des risques ?

Entretiens avec Jean GATEL, Paul VIRILIO. Le protocole Hernu-Savary. L'esprit de défense en Suisse.

## N° 53-54 / POLOGNE : LA RESISTANCE CIVILE (39 F)

Peut-on parler d'une stratégie non-violente en Pologne ? Un numéro exceptionnel où des historiens, des philosophes, des syndicalistes polonais cherchent à analyser les rapprochements possibles entre la stratégie de l'action non-violente et le combat de Solidarnosc. Un texte inédit en français de Kolakowski. Une interview de Milewski, président de Solidarnosc à l'étranger.

## BULLETIN D'ABONNEMENT

**Pour toute commande et abonnement  
utilisez le bulletin ci-dessous**

Tarif minimum : 80 F

Etranger : 92 F

Tarif de soutien : à partir de 120 F

Bulletin à renvoyer à

**A.N.V., CRAINTILLEUX - 42210 MONTROND**

Chèque à l'ordre de ANV - CCP 2915-21 U LYON



Nom : .....

Prénoms : .....

Adresse : .....

**JE SOUSCRIS UN ABONNEMENT D'UN AN (4 numéros)**

à partir du n° .....

Je désire recevoir

..... exemplaire(s) du n° .....

..... exemplaire(s) du n° .....

..... exemplaire(s) du n° .....

**PORT : 1 F par numéro**

Gratuit à partir du n° 45 et suivants et pour toute  
commande supérieure à 5 numéros.

Je verse la somme de ..... F par chèque  
postal, bancaire, mandat (rayer la mention inutile).

Je désire recevoir ..... exemplaires de ce tract  
(gratuit).

Je suis volontaire pour aider à la diffusion d'ANV dans  
la ville de ..... Envoyez-moi des  
instructions à ce sujet.

Date :

Signature :

## **UN OUTIL INDISPENSABLE**

**POUR**

- Comprendre les mécanismes de la violence  
(course aux armements, violences des Etats,  
des peuples ou des individus).
- Approfondir les fondements historiques, cultu-  
rels, psychologiques, politiques de la non-vio-  
lence.
- Réfléchir sur les liens entre l'action non-vio-  
lente et les grands problèmes de notre temps.
- Etre informé sur les recherches menées à  
l'étranger et en France sur les défenses non-  
militaires.

### **QUATRE FOIS PAR AN**

**DOSSIERS** faisant le point sur une ques-  
tion.

**ARTICLES** de fond.

**ENTRETIENS** avec des personnalités politi-  
ques, syndicales, universitaires, religieu-  
ses.

**DEBATS.**

**ANALYSES** de livres.

### **COMITE D'ORIENTATION**

Pierre ARCO  
Béatrice ARNOULD  
Jacques-Yves BELLAY  
Lydie BONNET  
Guy BOUBAULT  
Bernard BOUDOURESQUES  
Michel de CERTEAU  
Frédéric DELARGE  
Pierre FABRE  
Patrick GIROS

Jean-Marie MULLER  
Hervé OTT  
Bernard QUELQUEJEU  
Ina RANSON  
Laurent SAMUEL  
Marlène TUINGA  
Jean VAN LIERDE  
Anne-Marie de VILAINE  
Paul VIRILIO  
Patrick VIVERET

### **Rédacteurs en chef**

Christian MELLON  
Jacques SEMELIN

### **Directeur de publication**

Christian DELORME